

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

GRANDIOZA
JUBILEA
KONGRESO

KONGRESAJ
REZOLUCIOJ

43 IJK —
KRAKOVO

ABUNDA IJK —
ARTPROGRAMO

LA NEPO DE
D-RO ZAMENHOF
NIN SALUTAS

APOSTOLO
DE NIA IDEO

LIBRO PRI
BULGARA
ORNAMARTO



JARO 56 • N-RO 10 • OKTOBRO • '87



REZOLUCIO

de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto,
akceptita de la ferma ĝenerala kunveno, okazinta la
1-an de aŭgusto 1987

La 72-a Universala Kongreso de Esperanto, okazante de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto 1987 en Varsovio,
afirmante, ke la Internacia Lingvo Esperanto fariĝis plenumata komunikilo, kiu estas la libera posedaĵo de ĉiuj popoloj de la mondo;
agnoskante la grandan kontribuon de sennombraj uzantoj de Esperanto dum tuta jarcento por transformi la lingvon en riĉan esprimilon de plej diversaj kulturoj, inkluzive la kulturon de la Esperanto-komunumo mem;
notante, ke la Ĝenerala Konferenco de UNESKO rekonis la valoron de Esperanto per siaj rezolucioj de 1954 kaj 1985;
alvokas al la Esperanto-komunumo eniri sian duan jarcenton, sekvante la daŭre validan ekzemplon de Ludoviko Zamenhof, en spirito de paco, laboremo kaj espero;
instigas la Esperanto-organizaĵojn — landajn, fakajn kaj aliajn — elserĉi komunan grundon de kunlaboro kaj pli intense interŝanĝi ideojn por antaŭenigi Esperanton;
apelacias al ĉiuj aktivuloj de Esperanto direkti sin al instruado kaj praktika aplikado de la lingvo;
emfazas la neceson pliprofesiigi la laboron por Esperanto sur ĉiuj terenoj, alprenante aktualajn metodojn, utiligante modernajn teknikilojn kaj pli efike mastrumante la disponeblajn homajn kaj financajn rimedojn;
atentigas, ke Esperanto estas parolata en ĉiuj partoj de la mondo kaj ke necesas adapti la organizan strukturon de la Esperanto-komunumo, por plene speguli tiun tutmondecon;
plie atentigas pri la granda potencialo de Esperanto en la monda turismo kaj pri la bezono de pli multaj konkretaj agadoj sur tiu kampo;
forte rekomendas, ke en sia ekstera agado la Esperanto-Organizaĵoj emfazu la Unesko-Rezolucion de 1985 kaj instigu la registarajn kaj neregistarajn organizaĵojn, al kiuj ĝi estas direktita, plenumi ĝiajn rekomendojn;
substrekas, ke disvastigi la uzadon de Esperanto estas konstanta tasko de la Esperanto-komunumo sub la tegmenta gvidado de Universala Esperanto-Asocio.

Varsovio, la 1-an de aŭgusto 1987

Deklaro de Bjalistoko

El la urbo Bjalistoko, naskiĝloko de la kreinto de Esperanto, Ludoviko Zamenhof, unu el la grandaj humanistaj figuroj de nia epoko, la partoprenantoj en la 72-a Universala Kongreso de Esperanto sendas tiun ĉi deklaron al la ŝtatestroj kaj registaroj de la mondo okaze de la Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo.

1. Unu el la plej grandaj kaŭzoj de malamikigo inter la diversaj landoj de la mondo estas manko de scio. Tiuj, kiuj ne konas unu la alian, facile fariĝas viktimoj de antaŭjuĝoj kaj miskomprenoj.

2. Kvankam la edukaj sistemoj de la diversaj landoj povas multon fari por kulturi en la mensoj de siaj lernantoj informitecon kaj malfermitecon al aliaj popoloj, ankoraŭ pli valoraj ol abstraktaj lecionoj estas rektaj kontaktoj.

3. Kvankam la gazetaro kaj aliaj komunikiloj povas helpi ĉiujn civitanojn informiĝi pri aliaj popoloj, senpera komunikado inter homoj el diversaj landoj estas la plej bona maniero forigi antaŭjuĝojn kaj firimi la komprenigon.

4. La senpera kontakto postulas komunan lingvon. Se homoj parolas malsamajn lingvojn, ili ne povas senpere komunikiĝi. Kvankam lernado de aliaj naciaj lingvoj estas valora maniero transporti tiun dividon, la internacia lingvo Esperanto konsistigas aparte facilan kaj efikan metodon por atingi internacian interkomprenigon je tutmonda skalo kaj ĝi estas plej bona enkondukilo al la lingvolernado.

5. Esperanto — pro sia simpleco, logiko kaj tuta strukturo — estas ne nur lingvo taŭga por ĝenerala lernado, kiel la dua lingvo por ĉiuj, sed tra cent jaroj da utiligo en ĉiuj sferoj de la homa vivo, ĝi fariĝis plene esprimiva kaj fleksebla kaj ĝiaj parolantoj troviĝas en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo.

6. La mondaj problemoj, kiuj bezonas pritrakton je tutmonda skalo, ĉiam plimultiĝas. La demandoj de ekonomia evoluigo, de malmarmado, de malsato, de malsano, de analfabeteco, de mediprotektado k. s. postulas komunan kaj egalecan aliron pere de rekta komunikado en komuna lingvo. Regado kaj solvado de tiuj problemoj povas efike okazi nur per plena engaĝiĝo de la ordinaraj civitanoj.

7. Tial, ni rekomendas al ŝtatestroj, registaroj kaj kompetentaj aŭtoritatoj kaj instancoj de ĉiuj landoj utiligi Esperanton kiel studobjekton en lernejoj kaj ebligi rektajn homajn interŝanĝojn inter siaj ŝtatanoj kaj homoj el aliaj landoj pere de la Internacia Lingvo.

8. Ni firme kredas, ke el tiu rekta interŝanĝo ekestos pli klara interkompreniĝo inter ordinaraj homoj de ĉiuj landoj. Tio kondukos al reduktado de streĉiteco, al pli granda malfermiteco inter la popoloj, kaj al pli paca kaj libera mondo.

Ni invitas ĉiujn homojn de bona volo, kiuj konsentas kun tiuj ĉi principoj, apogi tiun ĉi Deklaron kaj tiel sin dediĉi al antaŭenigo de interkompreniĝo inter ĉiuj homoj de la mondo.

Bjalistoko, la 29-an de julio 1987



Karaj Gekolegoj!

Antaŭ cent jaroj, ĝuste en la hodiaŭa tago, en presejo apud nia nuna kongresejo, aperis malgranda libro. Ĝi nomiĝas, en la rusa lingvo, „Lingvo Internacia”. Ĝi priskribis simplan, bazan projekton de lingvo por faciligi la internacian komunikadon. Ĝia aŭtoro kaŝis sin malantaŭ la nomo „Doktoro Esperanto”.

Malmultaj estis la homoj, kiuj profetis korekte la estontecon de tiu libro. La presistoj, kiuj ĝin kompostis kaj pasigis tra la presilo, apenaŭ povis scii, ke, cent jarojn poste, kolektiĝos en Varsovio sesmil homoj el sepdeko da landoj por festi la finfaron de tiu simpla presea tasko. Malmultaj estis la homoj, eĉ inter tiuj, kiuj aĉetis la libron, kiuj povis ĝuste antaŭvidi, ke tiu eta kaj modesta broŝuro semos semon, kiu disbranĉiĝos en plenan kaj vivipovan lingvon, kiu etendiĝos en ĉiun angulon de la terglobo, kaj estos uzata por ĉiuj taskoj, ĉiuj funkcioj, por kiuj la homaj lingvoj estas uzataj.

Malmultaj estis la homoj, kiuj povis profeti la grandajn ŝanĝojn, la grandajn eventojn,

KOMUNE — EN SPIRITO DE PACO KAJ KUNAGADO!

(Festparolado de d-ro HUMPHREY TONKIN,
prezidanto de UEA)

kiuj trafos la mondon en tiu jarcento de tiam ĝis hodiaŭ. Eble la spirito de optimismo de 1887 profetis la aviadilon, la televidon, la spacveturadon, la komputilon. Eble ĝi profetis la grandajn gajnojn kontraŭ malsano kaj malriĉo, kontraŭ analfabeteco, kontraŭ malsato, kiujn registris nia jarcento. Eble ĝi povos antaŭvidi la konsciigon pri la homaj rajtoj, pri la rajtoj de virinoj, pri la rajto al demokrata partopreno en la socio, kiuj en nia epoko estis kodigitaj en la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj kaj aliajn dokumentojn.

Eble ĝi povos antaŭvidi la kreon de la Ligo de Nacioj kaj poste la fondon de Unuiĝintaj Nacioj, ĉar ja en tiu epoko la sopiro al superaciaj organizaĵoj, kiuj helpu la nacion vivi en paco, estis granda.

Sed ĉu tiuj legantoj de la Unua Libro, kaj tiuj laboristoj, kiuj ĝin presis, povus scii ke interne de tridek jaroj tuta Eŭropo plonĝos en la nokton de la plej granda milito, kiun iam ajn spertis la homaro? Ĉu ili imagus, ke ĉiuj tiuj eltrovoj de la scienco kaj la tekniko, kiuj levas la vivnivelon de la homoj, faciligos al ili la ĉiutagan vivon, pligrandigos ilian vivosperton — ĉu ili imagus, ke ili ĉiuj havos ankaŭ sian malluman flankon, kaj ke la brila tekniko, kiu alportos vivon, ankaŭ portos morton? La sensencan detruon de tiu mondmilito ni ŝuldas al la teknika progreso, per kiu unu nacio povis ĵeti kontraŭ alia armilojn neniam antaŭe eltrovitajn. Tiu brila progreso, kiun ili tiel admiris, detruis Dresden, detruis Coventry, kaj, en fina paroksismo de neniismo, detruis Hiroŝimon. Tiu brila teknika progreso forbuĉas hodiaŭ grandan parton de la fruktoj de ekonomio de la diversaj landoj en la formo de

armiloj. Kaj dum la grandaj potencoj provizadis sin per atomarmiloj, la Tria Mondo aĉetas pli simplajn armilojn je egala kosto al iliaj malbrilaj ekonomioj. Senprecedenca estas la nombro de lokaj militoj, kiuj hodiaŭ makulas la terglobon. Senprecedence multnombraj estas la rifuĝintoj de tiuj militoj.

Kaj la tekniko, kiu faris la tankojn kaj la militaviadilojn, kiu faris la atombombojn kaj la militraketojn, estis tiu sama tekniko, kiu eltrovis novajn metodojn por persekuti la homojn pro la raso al kiu ili apartenas, la religio, kiun ili kredas, la lingvo, kiun ili parolas. Temas pri la sama tekniko, kiu inventis la gasejojn kaj la fornojn, kiujn neniu homo, tie ĉi en Varsovio kunvenanta, por festi la centjarigon de Esperanto, povas plene forgesi.

Cu la legantoj de tiu Unua Libro povus antaŭvidi, ke la Familio de ĝia aŭtoro malaperos preskaŭ sen spuro, same kiel malaperos la domoj, en kiuj ili loĝas kaj la Varsoviaj stratoj, kiujn ili promenos?

Ludoviko Zamenhof utiligis kaŝnomon almenaŭ parte por eviti identigon de la Lingvo Internacia kun iu aparta homgrupo, iu specifa medio. Kaj okazis rimarkinda transformiĝo. Preskaŭ senpense, kvazaŭ sekvante la normojn, kiujn sekvas ĉiu homa lingvo en sia evoluo, la parolantoj de la lingvo de doktoro Esperanto komencis atribui tiun nomon ne al la homo, sed al la lingvo — la personeco de Doktoro Zamenhof kaj la fakto de la lingvo internacia komencis apartigi, kaj la kaŝnomo de la modesta doktoro transmoviĝis al lia lingvo. Dum Doktoro Zamenhof sekvis sian simplan, sed laborplanan vojon, instigante la esperantistojn al ĉiam pli forta laboro, verkante, tradukante, revante pri ĉiam novaj projektoj por proksimigi la homojn, pli kaj pli da personoj lernis kaj, uzis kaj fleksis kaj riĉigis la lingvon Esperanto. Kaj kiam en 1917 Zamenhof mortis, Esperanto tamen vivis.

Ĝi vivis tra ĉiuj ŝtormoj, ĉiuj uraganoj — tra la skismo de Ido, tra la skuoj de la Unua Mondmilito, tra la korŝira malsukceso ĉe la Ligo de Nacioj, tra la persekutoj de la 30-aj jaroj, tra la katastrofoj de la Dua Mondmilito. Ĝi vivis spite al antaŭjuĝoj, spite al superteraj reformoj, spite al organizaĵ fuŝoj, spite al ĵaluzoj kaj kvereloj.

Zamenhof nomis la fruajn adeptojn de la Lingvo Internacia „esperantoj“: „Rapide kreskas la afero per laboro de la esperantoj“. Lia poemo „La Espero“ tiel implicas, ke la parolantoj de tiu lingvo aliĝas al la „rondo familia“ de Doktoro Esperanto: ili fariĝis Esperantoj. La historion de lia lingvo, spite al la obstakloj, spite la renversojn, punktas belaj sukcesoj, kuraĝaj agoj. Ni memoras la tradukon de „Hamleto“, ni memoras Boulogne-sur-Mer, ni me-

moras la forajn pionirojn — Grabowski, Kazimierz Bein, Privat, Hodler. Ni memoras tiujn, kiuj dum la Unua Mondmilito laboris pere de Esperanto por ligi parencojn trans la batalado de oponaj armeoj. Ni memoras Kalocsay kaj Baghy. Ni memoras Cseh. Ni memoras la sukcesojn en Montevideo kaj Sofio. Ni memoras la kongresojn en Tokio kaj Pekino.

Ni ankaŭ memoras la personajn momentojn, kiuj vivigis Esperanton por nia unua renkontiĝo kun eksterlandanoj, nian unuan konsciiĝon, ke tiu ĉi stranga kombinaĵo de lingvaj elementoj nete pakumita, bele ligita de la dek ses reguloj, fundamentita, kunmetita, afiksita — kun siaj akuzativoj kaj korelativoj — siaj o-oj kaj n-oj kaj e-oj — efektive funkcias, efektive vivas, efektive esprimovivas. Se Zamenhof mortis, se herboj kreskas sur la ruinoj de iama Varsovio, Esperanto vivas, kaj prosperas. Kaj se ni kaj niaj kolegoj maljuniĝas en nia kunlaboro, vivas laste la esperantoj. Ili ĉirkaŭas nin tie ĉi, kaj ili portas nian lingvon en la estontecon.

Kion alportos tiu dua jarcento al Esperanto? Same kiel la unuaj adeptoj de la lingvo de doktoro Esperanto, same kiel la laboristoj, kiuj presis tiun broŝureton, ni apenaŭ povas profeti. Unu afero estas tamen tute klara: la lingvo mem, kiu pasis tra la fandejo de cent jaroj de evoluo, brile sukcesis. Neniu, kiu ĝin uzas, povas dubi, ĉu ĝi estas lingvo plena kaj kompleta. Neniu, kiu uzis ĝin en la scienco, aŭ legis ĝian literaturon, povas tion diri — eĉ se necesas daŭre ĝin modernigi kaj ankoraŭ kompletigi. Sed se ĝi brile sukcesis kiel lingvo, ĝi ankoraŭ ne brile sukcesis kiel lingva komunumo — la plejparto de la homoj ankoraŭ ne parolas ĝin, eble eĉ nenion scias pri ĝi. Ni havis niajn sukcesojn tiurilate: jen okazis sukcesaj informkampanjoj aŭ instruagadoj, jen oni akiris oficialan rekonon, jen fakuloj serioze ĝin traktis. Sed la granda laboro restas antaŭ ni.

Ĝi estas ja giganta laboro. Ĝi estas nenio alia ol konvinki la homojn, ke Esperanto prezentas la plej bonan solvon al la lingvaj problemoj de la mondo. Ĝi tion faras, ĉar ĝi estas facila kaj facile lernebla. Ĝi tion faras, ĉar ĝi estas neŭtrala. Ĝi tion faras, ĉar ĝi traktas ĉiujn homojn en spirito de egaleco. Ĝi tion faras, ĉar ĝi traktas ĉiujn homojn en spirito de egaleco. Neniu alia lingvo tion faras. Tiuj aliaj lingvoj prezentas pseŭdosolvojn, kiuj privilegias certajn homojn super aliaj kaj kiuj disvastigas certajn kulturajn valorojn kaj ne aliajn. Ili foje bele aspektas, ili foje aspektas nehaltigeblaj, sed ili ne solvas la fundamentajn problemojn, kiujn Zamenhof celis solvi. Ja finfine lia lingvo estis kaj estas pli ol proponata solvo de la lingva problemo: ĝi estas provo alfronti la spiriton de malegalo, de netolero, de malamo, kiu tiel disŝiras nian belan kaj serenajn mondon.

Multaj parolantoj de Esperanto ĝuas sian lingvon, kaj ĝin uzas, sen granda entuziasmo ĝin disvastigi. Al ili sufiĉas la kongresoj, ilia loka klubo, okazaj libroj aĉetitaj de la libroservo. Eĉ ĝenus ilian komfortan kaj hermetikan mondon subita alfluo de novaj lernantoj, novaj adeptoj. Ja per simpla utiligo de la lingvo ili helpas ĝian lingvan pliriĉigon. Sed, karaj kolegoj, tio ne plu sufiĉas. Venas nun la periodo de disvastigo. Ni kreis murojn ĉirkaŭ ni: sekuraj en niaj kluboj kaj kongresoj, ni ne bonvenigas adekvate la novulojn, ni ne sufiĉe pleddas por nia lingvo, ni ne alfrontas la publikon, ni ne agas sufiĉe discipline kaj celkonscie. Durante tion, mi neniun akuzas, mi neniun kritikas. Mi simple faras tiun ĉi konstaton: ke la lingvo ekzistas unue por ĝin disvastigi, due por ĝui. Fojfoje ni inversigas tiun ordon kaj forgesas nian veran celon.

Kiam Zamenhof kreis sian lingvon, li kaj liaj samtempuloj optimisme rigardis la estontecon. Ili opiniis la problemojn solveblaj. Ili kredis je la prospero. La posta jarcento montris, ke ili pravis kaj ne pravis: ke altiĝis la intenseco de la sukcesoj kaj samtempe la intenseco de la malsukcesoj. Sed ni ne forgesu, ke malgraŭ ĉio (kaj malgraŭ tio, ke la pliboniĝo ne estas universala), pliboniĝis la homaj kondiĉoj tra la pasintaj cent jaroj. Plivastiĝis la egaleco. Pligrandiĝis la demokratio. Necesas nun lerni la saman lingvon, por ke komune, solidare, en spirito de kompreniĝo, ni povu fronti kuraĝe la problemojn de la moderna mondo — laŭ la ekzemploj de Zamenhof kaj kun la sindediĉo, saĝeco kaj klarvido de realismaj esperantoj.

Rezolucio de MEM-kunveno

Ni, esperantistoj el la plej diversaj landoj, naciecoj, etnioj, rasoj, lingvaj influ-zonoj, el la kvin kontinentoj, kunigitaj per nia komuna Internacia Lingvo Esperanto, jam spertaj homoj en la praktikado de la interkomunikado kaj amikeco inter la popoloj,

konsiderante la opiniojn esprimitajn dum la „Tago de la Paco“, okaze de la 100-jara Jubilea Kongreso de Esperanto — Varsovio 1987,

konstatas la unuaniman volon defendi la pacon.

Ege maltrankvilaj pro la nukleaj kaj amasdetruaj armilaroj minacantaj senescepte ĉiujn,

dezirante pozitive agadi trans antaŭjuĝoj kaj stereotipoj akumulitaj en la internaciaj rilatoj kaj diplomataj kvereloj, laŭ nia volo al egalrajta libera interkomunikado,

ni urĝe alvokas kunigi la fortojn de la plej larĝaj homamasoj por ĉesigi la vetarmad-konkuradon.

Alte taksante la lastan pac-iniciaton de la prezidanto de la ŝtatkonsilantaro de Pollando, Wojciech Jaruzelski kaj ankaŭ la ideon kunvoki la renkontigon de la prezidantoj de la parlamentoj el la ŝtatoj partoprenantaj la Konferencon pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo,

kunvenintaj la 28-an de julio 1987 en Varsovio, la partoprenintoj en la kunveno de Mondpaca Esperanto-Movado (MEM), subtenas la proponitan programon:

- Likvidon de ĉiuj usonaj kaj sovetuniaj mezdistancaj kaj taktikaj raketoj en Eŭropo kaj tuja konkludo de kontrakto tiucele;
- drastan reduktion de la ofensivaj usonaj kaj sovetiaj strategiaj armiloj paralele kun la fortikiĝo de la regularo koncerne la antiraketan defendon;
- preventon de la militigo de spaco, malpermeson de la antisatelitaj sistemoj kaj de la „kosmo-tero“ armilaron, uzon de la kosmo al nuraj porpacaj celoj;
- absolutan malpermeson de la nukleaj eksplodprovoj;
- la plej tujan malpermeson de la kemiaj armiloj kaj ilian likvidon el la tuta mondo;
- gravan reduktion de la armeoj kaj konvenciaj armilaroj sur la tuta teritorio eŭropa de la Atlantiko ĝis Uralo, garantian malaltiĝon de la nivelo de milita kontraŭstarigo;
- konstantan daŭrigon de la milita ekvilibro je nivelo ĉiam pli kaj pli malalta kaj alkonformigitan reduktion de la militaj ŝtatspezoj;
- lokigon de efika kontrolo nacia kaj internacia pri progreso al malmarmado.

Grandioza jubilea kongreso



Roman Malinowski, prezidanto de la Pola Parlamento (dekstre), salutas la prezidanton de Pola Esperanto-Asocio Roman Dobrzynski, reĝisoro de la jubilea filmo. Maldekstre: s-ro Nigel Cassar, oficiala reprezentanto de la ĝenerala sekretario de UN.

(Pollando, Varsovio, 26. 07—1. 08. 1987)

*„... En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko. ...“*

Jes, ege forta voko!... En la solena inaŭguro de la 72-a Jubilea Universala Kongreso de Esperanto, okazinta la 26-an de julio j. k., en la kongresa halo de la Palaco de Kulturo kaj Scienco en Varsovio preskaŭ 6000 geesperantistoj kaj gastoj el 60 landoj, el ĉiuj partoj de la mondo, hore kantis la himnon de l'espero. Per tiu himno, antaŭ 100 jaroj, la kreinto de Esperanto d-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof, alvokis la homaron unuiĝi, per unu komuna lingvo, en la nomo de frata kaj paca interkompreniĝado, por unu mondo strebanta „ne al glavo sangon soifanta“, sed al tuthomara „sankta harmonio“!...

En la unua tago de la dua jarcento de Esperanto en la grandega kongresa halo ne estis lokoj por ĉiuj kongresanoj! Do, (eble senprecedenca fakto!) la kongreso estis inaŭgurita dufoje!...

En sia salutparolo la Alta Protektanto de la kongreso, la prezidanto de la Pola Parlamento Roman Malinowski, diris: „En la centjara jubileo de Esperanto vi kongresas en Pollando ne nur por sumigi la ĝisnunajn atingojn de via movado, fiksi planojn por la estonteco, sed ankaŭ por omaĝi la grandan homon — Ludoviko Zamenhof, kiun Unuiĝintaj Nacioj nomis „filo de la tuta homaro“... Kun granda ĝojo — kiel Alta Protektanto de la kongreso kaj kiel samurbano de Zamenhof el Bjalistoko — mi anoncas, ke la Komitato de Universala Esperanto-Asocio plene subtenis mian ideon: konstrui la monumenton de la 100-jariĝo de Esperanto en formo de MONDA ESPERANTO-CENTRO „LUDOVIKO ZAMENHOF“ en Bjalistoko!... Ĉe la sojlo de la dua jarcento de Esperanto — diris konklude R. Malinowski, — el la atingaro de ĉi tiu kongreso oni ĉerpos la inspiron por efektivigo de la eterna revo de la homaro pri komuna lingvo internacia, proksimi-

ganta la homojn kaj naciojn kaj servanta al la komuneco de iliaj pensoj kaj agoj. ... Al via Esperanto-movado, kiu ankaŭ farigis la mia, mi deziras sukceson de la celoj komunaj por ni ĉiuj: interkompreniĝo, amikeco kaj kunlaboro, venko de la ideo de firma paco sur la Terolo!“

Per kortuŝaj vortoj sin turnis al la kongresanoj d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof, nepo de la kreinto de Esperanto, honora gastulo de la kongreso. Pluraj aliaj parencoj de Ludoviko Lazaro Zamenhof honoris la kongreson per sia ĉeesto en la salonego, varme aplauditaj de la kongresanoj. En sia salutparolado Nigel Cassar, speciala reprezentanto de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj Xavier Perez de Cuellar, emfazis la komunan humanisman strebado de UN kaj de la Esperanto-movado, „... kiu povas fari multon por antaŭenigi la pacon“. Donante varman apogon al la varsovia kongreso, li konkludis: „Ni aprezas vian entuziasmon kaj plenkore subtenas vin“.

La longa vico de nomoj de ĉeestantaj diplomatoj kaj reprezentantoj de landaj E-asocioj kaj aliaj lokaj movadoj reliefigis la tutmondecon de ĉi tiu kongreso. Aparte varmajn aplaŭdojn ricevis la reprezentantoj de kelkaj afrikaj landoj kaj la 31 partoprenantoj en la Infana Kongreseto.

Inter la dekoj da ricevitaj salutoj al la kongreso, aparte menciindas tiuj de la Ĝenerala Direktoro de UNESKO Amadou Mahtar M'Bow, de la prezidanto de Islando kaj de la prezidanto de la sveda parlamento Ingemund Bengtsson.

Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, anoncis la Premion Onisaburo Deguci, aljuĝotan dum la Tago de Paco al homo, kiu elstare kontribuis al realigo de la celoj de UEA.

La solena parolado de d-ro Humphrey Tonkin, prezidanto de UEA, estis inspirita de la malfacila, tamen glora vojo de la monda Esperanto-movado kaj de la perspektivoj por ĝia evoluo kaj disvastiĝo dum la dua jarcento. Kiel emfazis d-ro Tonkin, dum la dua jar-

cento la mondan esperantistaron atendas obstina laboro por plua disvastigo de Esperanto, por ke ĉiam pli multaj homoj konvinkigu, ke Esperanto estas la plej bona solvo de la lingvaj problemoj de la homaro, ĉar ĝi estas facile lernebla, neŭtrala, demokratia kaj kreas ĉe la ĝin parolantaj homoj senton pri memfido kaj egalrajteco.

Ĉion ĉi plej elokvente pruvis la jubilea 72-a UK de Esperanto en Varsovio. Miloj da homoj el dekoj da landoj interkonatiĝis, diskutis, spektis teatraĵojn, filmojn, ĝuis plenumojn de kantistoj kaj aktoroj sen interpretado, interparolis, facile komprenante unu la alian. Ĉio ĉi estis respegulita sur la paĝoj de la ĉiutaga „Kongresa Kuriero“ — riĉenhava, profesie redaktita de Andrzej Pettyn kaj Stano Marček.

La kongresa programo estis tre riĉa, kaj ĉi-foje speciale je kultur-amuzaj aranĝoj. Vice kun la jarkunvenoj de specialigitaj internaciaj asocioj kaj organizaĵoj — medicinistoj, instruistoj, fervojistoj, poŝtistoj, verkistoj, filatelistoj, k. a. aparte menciindas la kunvenoj de MEM (Mondpaca Esperanto-Movado) kaj de KEK (Kolektivo Esperantista Komunista), kiujn partoprenis multaj bulgaroj. Plej valoraj estas la rezolucioj de ili akceptitaj, kiuj alvokas la esperantistojn batali por savo de la homaro de nuklea katastrofo, kontraŭstari la kalumniojn kontraŭ la socialismaj landoj, kontraŭ la progresemaj pacdefendantoj en la tuta mondo.

Bonege organizita kaj okazigita estis ankaŭ la kunveno de TEĴA (Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio) kaj de ILEF (Internacia Ligo de foto-kinamatoroj), gvidata de Ivan Keremiĉiev (vicprezidanto kaj ĉefredaktoro de revuo „Internacia Jurnalisto“) kaj de Donĉo Hitrov (prezidanto de ILEF). Ili ambaŭ raportis pri la organiza stato de tiuj du unuigitaj organizaĵoj kaj pri ties atingoj dum la pasintaj tri jaroj. Iliajn raportojn sekvis vigla diskutado kun

bonintencaj rekomendoj, ke TEĴA plibonigu la artan aranĝon kaj la enhavon de la revuo kaj estigu siaspeca esperantista informagentejo. Donĉo Hitrov anoncis, ke laŭ invito de esperantistoj el Vraca la Dua Internacia Foto-Kino Festivalo okazos en oktobro venontjare en tiu nord-okcidenta bulgara urbo. Estis elektitaj novaj membroj de la estraro de TEĴA: Joachim Schulze, ĉefredaktoro de „Saksa Kuriero“ (GDR), Stano Marček, ĉefredaktoro de „Esperantisto Slovaka“ (CSSR), Vasilij Stanoviĉ (USSR), Lech Kosieniak (Pollando) kaj Evgenij Georgiev (Bulgario). La kunveno aprobis kiel honorajn membrojn de TEĴA la ĝisnunajn estraranojn: Olaf Thormodsen (Norvegio), Tados Megali (Egiptio) kaj Nikolaj Danovskij (USSR).

Krom la sciencaj raportoj en la Internacia Kongresa Universitato kun rektoro prof. Juan Régulo Pérez, krom la lekcioj kaj prelegoj en multaj apartaj seminarioj, dum la kongresaj tagoj estis prezentitaj pli ol 20 teatraĵoj kaj koncertaj programoj kun la partopreno de pli ol 600 plenumantoj el diversaj landoj. Aparte riĉaj, bonege enscenigitaj estis la Pola Nacia Arta Vespere kaj la Internacia Arta Programo.

Multflanka kaj ege aktiva estis la partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la kongresaj programoj kaj aranĝoj, kies nombro superis 400.

En la Bulgara Kulturcentro en Varsovio estis aranĝita foto-ekspozicio, dediĉita al la 80-jariĝo de BEA. La solenan inaŭguron ĉestis multaj reprezentantoj de la polaj, art-kulturaj medioj, de amaskomunikiloj, alilandaj jurnalistoj, esperantistoj el diversaj landoj. La prezidanto de BEA Sava Dălbokov korvarme bonvenigis la gastojn kaj koncize skizis la 80-jaran vojon de BEA, ĝiajn glorajn atingojn en la disvastigo de Esperanto en Bulgario, spite al la persekutoj kaj la teroro de la faŝismaj regantoj. Li priskribis la novan epokon de la E-movado en Bulgario post la venko de la socialisma revolucio. Multajn favorajn impresojn



Ĝenerala vido al la plenplena kongresejo

oni povus legi en la speciala albumo de la ekspozicio.

Kun brila sukceso, ĉiam en plenplenaj salonoj, la Bulgara Esperanto-Teatro (kun gvidanto-organizanto Kunĉo Vălev kaj sub la reĝisorado de Gertruda Lukanova), kelkfoje prezentis la teatraĵojn „Pikniko sur la bataalkampo” de Arrabal kaj „La kaverno de Salamanca” de Cervantes. BET denove pruvis sian altan nivelon de aktora majstrecio kaj de bela Esperanta elparolo, kio jam de jaroj vicigas ĝin inter la plej bonaj en la mondo Esperantaj teatraj kolektivoj.

Agrabla surprizo por la publiko estis la debuto de la Stata Pupteatro el Vraca, kiu prezentis la pupteatraĵojn „La ovo” de Boris Aprilov, sub reĝisorado de prof. Nikolina Georgieva. La scenografio de Iva Hăgieva, la originalaj kostumoj kaj la bonega ludo de la junaj interpretistoj provokis varmajn aplaŭdojn.

Dum la recitalo-koncerto „Nia kara lingvo” profunde kortuŝis la publikon per sia majstra plenumo la bulgaraj aktoroj kaj kantistoj, inter kiuj aparte elstaris la kantistino Maria Angelova, Ljudmila Kocova, la aktorino Hrisula Garidi, k. a. Sincerajn aplaŭdojn ili gajnis ankaŭ per sia partopreno en la renkontiĝo-koncerto kun sovetiaj esperantistoj en la Domo de la Sovetia Kulturo kaj Scienco en Varsovio kaj dum la Internacia Arta-Muzika Programo en la Kongresejo.

Sub la gvidado de la bulgara muzikisto Dimităr Terziev la Internacia Esperantista Koruso senĉese enverŝadis torrentojn da freŝaj melodioj en la kongresan etoson, kaj la plenumo de lia verko — himno pri Esperanto, merite alportis al li la premion por muzikaĵo en la konkurso de UEA.

En la abunda filma programo elstaris la kelkfoja solena prezento de la plenlonga kolora dokumenta filmo „Esperanto — jarcento unua”, kiun iniciatis jam en 1982 Donĉo Hitrov, prezidanto de ILEF. Laŭ komuna scenaro de Donĉo Hitrov kaj de la elstara pola reĝisoro-dokumentisto Roman Dobrzynski, prezidanto de Pola Esperanto-Asocio, tiu lasta realigis la bonegan ideon. La filmo estas kunproduktado de la bulgara kaj pola filmaj studioj „Interfilm” kaj „Inter-

press-film”, kiuj financis tiun kuraĝan entreprenon. Roman Dobrzynski filmis en 14 landoj kaj sukcesis brile prezenti la disvastigon de Esperanto kaj ĝian aplikon en ĉiuj sferoj de la vivo. La belegajn filmbildojn pliriĉigis multaj interesaj intervjuoj kun esperantistoj el diversaj partoj de la mondo. Do, la filmo pri la unua jarcento de Esperanto jam estas fakto!...

La plej grava rekono pro la tuteca organiza kaj krea agado de Bulgara Esperantista Asocio — unu el la plej amasaj kaj plej aktivaj en la monda Esperantomovado, estis la aljuĝo al ĝi de la pokalo „Fein” fare de la Estraro de Universala Esperanto-Asocio. Tiu alta distingo estas granda fiero por la bulgaraj esperantistoj kaj devigas ilin labori ankoraŭ pli aktive kaj sindone por disvastigo de Esperanto en Bulgario kaj en la mondo dum ĝia dua jarcento, esti inspiritaj batalantoj por konservado de la vivo sur nia planedo, por interkompreniĝo kaj kunlaboro inter la popoloj.

Dum solena ceremonio en Bjalistoko — naskiĝurbo de d-ro Zamenhof, estis akceptita oficiala Deklaro, en kiu estas emfazita la granda kontribuo de Esperanto al la batalo por homa progreso, malmarmado, forigo de la analfabeteco, de malsanoj kaj malsato en la mondo kaj prevento de nuklea katastrofo. Tiu Deklaro alvokas ĉiujn ŝtatestrojn, registarojn kaj gvidinstancojn en ĉiuj landoj enkonduki Esperanton kiel studobjekton en la lernejojn, faciligi senperajn kontaktojn pere de Esperanto — por interkompreniĝo kaj kunlaborado en paca kaj libera mondo. Al tiu ĉi Deklaro aliĝis ankaŭ la Rezolucio, akceptita fare de Mondpaca Esperantomovado (MEM).

La grandioza Jubilea Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio pritraktis kaj aprobis gravajn taskojn kaj elmontris helajn perspektivojn por la plua popularigo de la Lingvo Internacia inter ĉiam pli vastaj sociaj tavoloj en la tuta mondo, por interproksimiĝo de la popoloj, por fruktodona kunlaborado pere de unu komuna lingvo en paca kaj feliĉa mondo.

Varsovio—Sofio,
aŭgusto, 1987

Donĉo HITROV



Amika renkontiĝo kun sovetaj esperantistoj antaŭ la kongresejo. En la centro: prof. Magomet Isaev, prezidanto de ASE, kaj Lidija Ŝanina, ĝia sekretario.



Sojle de la dua jarcento

Verkante pri tiu evento mi konscias, ke mi dokumentas historion. La historion de la tutmonda junulara Esperanto-movado. Ĉar mi esperas, ke iam — post jaroj, adeptoj de la Internacia Lingvo eble interesiĝos kiamaniere iliaj tiamaj samaĝuloj festis la 100-jariĝon de Esperanto. Kion mi dezirus diri al tiuj estontaj esperantistoj?

Lewkowicz), „Lingva problemo en la scienco kaj la rolo de Esperanto ĉi-riate“ (L. Kordylewski), „Esperanto-bibliotekoj en la mondo“ (H. Worsztynowicz) ka. Menciindas la prelego „Esperanto en la Tria Mondo“ de la pakistanano Saeed Ahmed Faramid, kiu, por partopreni la kongreson, vendis siajn tajpilon kaj dek-jaran bibliotekon.

Pri la riĉeco de la kongresa programo atestas ankaŭ la kursoj de Esperanto por komencantoj, de pola lingvo kaj sanskrito; la ekzercoj pri desegnado kaj pentrado, magio-iluzio, teatro-ekzercoj kaj diversaj amuzludoj. Mi ne povus silenti pri la sukcesaj plenumoj de la Internacia Koruso sperte gvidita de Kostas Za-



Dum la solena inaŭguro de la 43-a IJK la eksa prezidanto de TEJO Ian Jackson dankesprime donacas la libron „Sinjoro Tadeo“ de Adam Mickiewicz al s-roj Wiesław Woda — vicurbestro de Krakovo, kaj al Antoni Dragan (dekstre de Ian Jackson) — prezidanto de la Asocio de Polaj Studentoj.

Dum la 43-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) por unua fojo tiel forte evidentiĝis la proceso de ekstereŭropigo de la E-movado. La forumon partoprenis gesamideanoj el Algerio, Brazilo, Benino, Centra Afrika Respubliko, Ĉinio, Eburio, Ganao, Israelo, Japanio, Kanado, Kamerunio, Madagaskaro, Senegalio, Singapuro, Sirio, Sudkoreio, Pakistano, Tanzanio, Togolando, Usono. Fakte en la naskiĝlandon de Esperanto, por ĉeesti tiun kongreson, alvenis junaj esperantistoj el 47 landoj de 4 kontinentoj. Ilia nombro estas rekorda en la historio de junularaj E-kongresoj — pli ol 1100.

Dum unu semajno (17—24. 07. 1987) en Krakovo — lulilo kaj koro de la pola kulturo, la juna generacio de la tutmonda Esperanto-movado ne nur amuziĝis, sed ankaŭ serioze laboris. Mi aparte rakontos pri la kunsidoj de la plej supera organo de la Tutmonda Esperanto-Junulara Organizo (TEJO) — de ĝia Komitato. Nun mi parolos pri la riĉa seminario programo subigita al sufiĉe aktuala ĉeftemo „Homo kaj civilizaj minacoj“, traktita per multe da prelegoj kaj ekspozicioj. Jen kelkaj prelegaj titoloj: „Polaj paciniciaĵoj kaj agadoj“ (L. Kosieniak), „La nuklea vintro“ (A. Wandel), „Acidaj pluvoj — minaco por la medio“ (K. Tytgat), „AIDS — ĉu la homaro suferos ĝin“ (M. Sharp), „Rolo de la bestĝardenoj en la savo de la bestspecioj“ (P. Gruh). Per raportoj estis tuŝitaj ankaŭ diversaj esperantologiaj kaj movadaj temoj: „Raciigita gramatiko de Esperanto. Elektitaj ekzemploj“ (A. Golonka), „La lingva nomo en Esperanto“ (R. Rokicki), „Fundamentoj kaj kaŭzoj de la kreado de planlingvoj en 19-a jarcento. La historia, filozofia, religia lingvistiko kaj soci-politika analiza studo“ (A.

Barakis. Ankaŭ varia estis la sporta programo.

Ne estis preterlasita la scivolemo de la eksterlandanoj viziti la historiajn vidindaĵojn de fama Krakovo. Multe da junulinoj havis la feliĉon sin foti kun la legenda Wawel-drako, sen estiĝi ĝiaj viktimoj. Tiu ruza drako denove estas populara inter la virinoj, ĉar ĝi emblemo de la 43-a IJK. La dommastroj ankaŭ organizis tuttagajn ekskursojn al tri lokoj (laŭ deziro): la eksa hitlera koncentrejo en Oświęcim, la salminejo en Wieliczka kaj montara ripozloko en Zakopane. La 22-an de julio kongresanoj partoprenis tuturban solenajn okazo de la Nacia Festo de Pollando.

Raportante pri la kongresa laboro mi komencos per prezento de la nova 5 — membra TEJO-estraro: prezidanto — Jan Koszmaluk (Pollando), ĝisnuna ĝenerala sekretario de TEJO. La postenon de ĝenerala sekretario transprenis Dietrich Weidmann (Svislando). Kiel estraranojn oni elektis Sándor Hideg kaj Rezső Baross (Hungario). La kasisto estos Claude Rouget (Francio).

Jen la novaj komitatanoj „C“: Andy Künzli (Svislando), Paweł Janowczyk (Pollando), Ljubomir Trifonovski (Bulgario), Norberto Saletti (Italio), Tihope Privas (Benino), Silvia Pilger (Nederlando).

La dua komitatano de UEA por TEJO jam estas Martin Haase (FRG), ĝisnuna vicprezidanto de TEJO.

Antaŭ la estrarelektadoj estis pritaksita la laboro de la eksaj TEJO-estraranoj kaj akceptita la estrara raporto por 1987. Poste la Komitato difinis la prioritatojn de la TEJO-estraro. Kiel plej serioza problemo elstaris la malfacila financa stato de TEJO kaj eliri el tiu situacio estos unua tasko de la nova estraro.

Enkadre de la Komitatkunsido fruktodone agis la laborgrupoj pri eksteraj rilatoj, eldonaĵoj, financoj, komitataj reglamentoj, kongresoj, kulturo, landa agado kaj scienca aplikado.

Post vigla diskutado Kataluna Esperanto-Junularo estis akceptita kiel 27-a landa sekcio de TEJO, malgraŭ ke Kataluna Esperanto-Asocio ne estas memstara membro de UEA kaj apartenas al Hispana Esperanto-Federacio. Ankaŭ estis traktita la kandidatigo flanke de Dana Junulara Sekcio estiĝi landa sekcio de TEJO. Oni prenos la decidon dum aŭtuna letera voĉdonado, ĉar la dokumentoj de la kandidato ne estis en ordo.

En la Komitaton ankaŭ venis du kandidatigoj por organizo de IJK en 1989 — de Svislando kaj Nederlando.

Dum tuttagaj lacigaj sesioj de la komitatkunveno kiel observantoj ĉeestis reprezentantoj de la Junulara Sekcio de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Estis pridiskutitaj la eblecoj por pli intimaj rilatoj inter ambaŭ organizoj.

Fine mi dirus, ke dum la kongresa komitatkunveno oni vidis ne nur novajn vizaĝojn en la komitatkonsisto, sed oni sentis ilian aktivan partoprenon kaj kontribuon dum la laboro. Tiu fakto donas esperon pri pli hela periodo en la historio de TEJO, dum kiu oni devas likvidi la financon krizon, pli efike labori kun ĉiuj landaj sekcioj kaj neesperantistaj organizoj.

Se ni volus vidi

LA BULGARAN KONTRIBUON

al la kongresa laboro kaj programo, ni devus serĉi ĝin en kelkaj direktoj. Kiel plej multnombra landa sekcio de TEJO, Bulgara Esperanto-Junularo havas kvar komitatanojn „A“ en la Komitato, nome: Cvetka Miteva, Mariana Elenova, Maria Jankova kaj Ljubomir Trifonĉovski. Post kiam la lasta estiĝis „C“-komitatano, dum la sesioj kiel „A“-komitatano lin anstataŭigis Kremona Baĉeva. Ili ĉiuj aktive partoprenis la pridiskutojn kaj kunsidojn de la laborgrupoj. Oni elektis Cv. Miteva kiel membron de la Kandidata Komisiono kaj L. Trifonĉovskian — de la Voĉdona Komisiono.

Maria Jankova kaj Ljubomir Trifonĉovski estis el tiuj, kiuj ĉe-kape kun Andy Künzli prizorgis la eldonadon de la ĉiutaga kongresa bulteno „Smoko“¹ informas“.

¹ Smoko (pole) — drako (Not. de la Red.)

Prof. Hristo Marinov kaj Ljubomir Trifonĉovski partoprenis la seminarian programon per originalaj prelegoj.

Ankaŭ estis starigitaj duflankaj kontaktoj kun reprezentantoj de diversaj junularaj sekcioj por eventualaj pli intimaj ligoj. Okaze de la 100-jariĝo de Esperanto-Junularo, Cvetka Miteva — prezidantino de Bulgara Esperanto-Junularo, transdonis orajn jubileajn medalojn al TEJO-aktivuloj, kiuj lastatempe aparte kontribuis al la kontaktoj inter TEJO kaj BEJ, nome al Ian Jackson, Jan Koszmaluk, Andy Künzli, Leszek Lewandowski kaj Jarek Parzyszek.

Multnombra estis la bulgara grupo, kiu partoprenis la kongreson — 80 gejunuloj el la tuta lando. Ili lasis bonan impreson, ĉar strebis uzi la internacian medion por plibonigi sian lingvan nivelon.

Eble la etaj partoprenantoj en la kongreso kaj, kompreneble ankaŭ iliaj gepatroj, ne forgesos la brilan spektaklon „La ovo“ — prezentita de la puĉteatro el Vraca. Mi volas menciigi ankaŭ la impresajn plenumojn de la kantgrupoj „Verda Stelo“ el 4-a sofia lernejo (kun gvidantino Viktorija Jotova) kaj „Ruĝaj Fajretoj“ el Jambol (kun gvidantino Liljana Paraŝkeva). Ili gajnis dufoje la sincerajn aplaŭdojn de la publiko. La operkantisto el Jambol Todor Atanasov, ricevis multajn gratulojn pro sia profesia kantado. La ciganaĵromancoj de Mariana Elenova agrable surprizis tiujn, kiuj ne havis la okazon aŭskulti ŝin antaŭe.

Konklude ni devas danki al la junaj polaj esperantistoj, ĉar ili sukcesis prepari bonan kongreson, malgraŭ iuj malfacilaĵoj. Eksepte de kelkaj grupoj, la partoprenantoj loĝis, manĝis kaj kongresis en najbaraj konstruaĵoj enkadre de studenta urbeto. La organizantoj konvinkis siajn gastojn, ke la junulara Esperanto-movado en Pollando estas sufiĉe forta kaj multnombra. Dum la kongresaj tagoj ĉie — en la kongresejo kaj dum la diversaj ekskursoj, ni vidis multajn polojn kaj ĉiuj bone scipovis la lingvon. Certe LKK sukcesis, ĉar ĝi havis la apogon de ŝtataj, sociaj kaj urbaj organizoj. Multe helpis ankaŭ la Asocio de Polaj Studentoj, kun kiu Pola Studenta Esperanto-Komitato kunlaboras jam preskaŭ tridek jarojn.

Do, ni turnu nian rigardon al la jaro 101-a de la ekzisto de Esperanto, kiam en Zagrebo oni organizos la 44-an IJK, kun ĉeftemo „Komunikado en la 21-a jarcento“.

Krakovo—Sofio, julio 1987

Maria JANKOVA

„Smoko“ gaste al „Bulgara Esperantisto“



Ĉiutaga bulteno de la 43a Internacia Junulara Kongreso de TEJO, Krakovo

Georgo Handelik prezentas kelkajn de li el la pola lingvo tradukitajn epigramojn. Ili estas verkitaj de la plej ŝatata pola satiristo Jan Sztandinger:

RETO POR BELA KNABINO

Kuraĝe, rapide,
En tenton min gvidu!

EDZIĜO POR VIRO

Edziĝo por viro — la plej granda bono;
Gardiston li gajnas por koro kaj mono.

PROBLEMOJ DE OLDULOJ

Ne efikas komplimentoj
Kiam glase kuŝas dentoj . . .

PLIGRANDIĜO

Dum silento kaj mallumo
Pligrandigas interumo.

Abunda kaj varia artprogramo

La kulturprogramo de la 43-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) proponis al la partoprenintoj tiom multe da diversspecaj arangoj, ke estis malfacile partopreni en ĉiuj. . . Ili okazis en la sporthalo „Wisla“ kaj en klubejo „Filutek“. La lastan vesperon dum la adiaŭa balo mi sukcesis paroli kun kelkaj partoprenantoj kaj peti ilian opinion pri la kongresa kulturprogramo.

Torsten Bendias (GDR):

„Pro la partopreno de pluraj landoj ĉi-jare la kulturprogramo estis tiel riĉa, kiel neniam ĝis nun. La kultura nivelo en la junulara movado plialtiĝis dum la lastaj jaroj. Ekzemple iu muzikisto, kiu volas studi la internacian folkloron, devus veni ĉi-tien, anstataŭ vagadi tra la tuta mondo. Ankaŭ la nivelo kaj multnombro de la teatraj prezentaĵoj estis tia, ke oni povas diri: „En la jubilea jaro de Esperanto oni konstatas, ke vere ekzistas E-kulturo“.

Inna Vorlinskaja (USSR):

„Mi eĉ ne imagis, ke estas tiel multe da talentaj homoj inter ni. Mi ĝis nun ne kredis, ke en Esperanto oni povas kanti tiel bele, moderne kaj profesinivele. La kultura programo estis je plej alta nivelo“.

Janos Balla (Hungario):

„Entute ĉio estis valora. Precipe iuj el la prezentaĵoj, kiel ekz. la Internacia Koruso, gvidata de Kostas Zaharakis, kiu fakte tre rapide kaj rezultodone laboris“.

Kim J. Henriksen (Danlando), membro de internacia muzikensemblo:

„Tio estas mia deknua IJK. Dum la lastaj du kongresoj mi mem oficiale partoprenis la kulturprogramon. . . Mi ŝatus diri, ke estas ege grave doni al la uloj, kiuj faras E-kulturon, kondiĉojn por povi bone labori. Kaj ĉi tie ni havis ekz. teknike tre bonajn kondiĉojn, sed ni ne havis lokon por sufiĉe sin prezenti. . . Oni povas fari vere Internacian E-kulturon — ekzemple francino kaj hungaro ludas kaj faras kantojn kune. . . Ĉi-jare en IJK estas invititaj bonaj muzikgrupoj kaj teatroj. Eble estas iom malfacile fari etoson, ĉar la halo estas tre granda. . .“

Andy Künzli (Svislando):

„Por mi estis interese, ke prezentigis novaj homoj — ekz. el Afriko, Armenio. . . Rilate la bulgaran programon — ĝi havis tre altan nivelon. Precipe plaĉis al mi la grupo el Jambol.“

Diversaj opinioj, diversaj vidpunktoj. La programo havis multe da kvalitoj kaj iom da fuŝoj — kaj tio estas natura! Jes, la komenco de la programo ĉiuvespere malfruigis. Sed ĉu tio estis decida por la humoro de la ĉeestintoj? Eble iom jes, sed ne tro. . .

Mi ŝatus ankaŭ diri kelkajn vortojn pri la bulgara partopreno. Ĉi-foje ĝi estis gratulinde altnivela kaj multnombra. Entute la kulturprogramon partoprenis 58 bulgaroj. La spontane organizita bulgara programo en klubejo „Filutek“ surprizis kaj emociis forte la publikon. La bulgara folkloro programo, plenumita E-lingve de grupo „Verda Stelo“ el IV lernejo — Sofio, kun gvidantino Viktorija Jotova; la kantgrupo „Rugaj Fajreroj“ el Jambol, kun gvidantino Liljana Parasheva; la ciganaj romanoj, plenumitaj de Mariana Elenova, allogis tiom forte la kongresanojn, ke je la 2-a horo post noktomezo neniu volis foriri kaj en la plenplena klubejo sonis la emociaj krioj „An-ko-raŭ!“ „An-ko-raŭ!“ Kantoj, popoldancoj — vera junulara Etoso!

La dua partopreno de bulgaroj estis en la Internacia Vespere, kie krom la jam menciitaj partoprenantoj kantis ankaŭ Todor Atanasov — juna solisto el la Stata Muzikteatro en Jambol. La publiko estis denove ravita de la bulgaroj! T. Atanasov partoprenis ankaŭ la adiaŭan spektaklon kun la sama sukceso.

Ni ne forgesu la ĉarman spektaklon „La ovo“ de Boris Aprilov — prezentita je alta profesia nivelo de



Kantensemblo „Verda Stelo“ brile sin prezentis

geaktoroj el la Stata Pupteatro — Vraca, sub la reĝisorado de prof. Nikolina Georgieva. Kelkfoje post la fino de la spektaklo la publiko alvokis la geaktorojn sur la scenejon. . .

En la nomo de la Estraro de Bulgara E-Junularo mi dankas al ĉiuj partoprenintoj pro ilia bonega prezentado!

Kaj jen la konkludo de la organizantoj. Mi prezentas al vi la respondecon pri la kulturprogramo en LKK — Leszek Lewandowski:

— **Kia estas via pritakso pri la rezultoj de via laboro?**

— Mi bedaŭras, ke ni ne sukcesis ĝisfine fari la t. n. „aktivan“ parton. Temas pri la laborgrupoj. En nia plano estis 6—7 diversspecaj programeroj, sed ni aŭ ne trovis homojn, kiuj faru tion je profesia nivelo, aŭ pro teknikaj kaŭzoj tio ne sukcesis. Ni realigis 50% de niaj planoj. La samo okazis kun la ekspozicioj. . . Mankis rido. La programo povus esti pli riĉa.

— **Al kio vi strebis?**

— Mi volis montri, ke la E-kulturo povas esti interesa ankaŭ por neesperantistoj. Ekz. la festo ĉe „Blonja“ sub libera ĉielo estis interesa kaj krakovanoj povis spekti tion. Homoj, kiuj diras, ke la E-kulturo finiĝas ĉe la kanto „Verda Stelo“ kaj „Esperanto por paco!“ ege eraras! Ĝi povas esti sur sama nivelo kiel la nacia.

Ni volis, ke ĉiu kongresano kaptu por si ion, kio estas por li interesa.

— **Kio surprizis vin pleje dum la kongreso?**

— La Internacia Vespere kaj la kapabloj de la homoj inter ni, sed tamen ili ne estas sufiĉe bone uzataj.

— **Kiom da programeroj estis prezentitaj dum la kongreso?**

— Ses teatraj prezentaĵoj, kvar rok-grupoj, unu ĵaza-suinga grupo, dancgrupo „Impuls“, dudeko da gitaroj, du saksofonoj aperis sur la scenejo. Ĉe mikrofono kantis ĉirkaŭ 120 homoj krom la korusoj. Entute — 30-hora kulturprogramo dum sep vesperoj, (sen nombri la tempon pri dancado). Abunda, interesa, riĉa! . . .

Mariana ELENOVA



D-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof ĉe la kongresa tribunuo

La nepo de d-ro Zamenhof nin salutas

nis en Varsovio por omaĝi la faron kaj la memoron de lia avo d-ro Zamenhof, utiligante kiel komunan lingvon nome lian kreaĵon — Esperanto. Eĉ nur tiu sola fakto montras la esperplenan estontecon de la Lingvo Internacia. . .

Dum la interparolo de Roman Dobrzyński kun d-ro Zaleski-Zamenhof mi staris malantaŭ la televida kamerao kaj sukcesis foti ilin ambaŭ de proksime. Kiam d-ro Zamenhof-Zaleski varme gratulis R. Dobrzyński pro la belega filmo pri la 100-jariĝo de Esperanto, la reĝisoro montris min kaj d-ron Ulrich Lins — nian konsultaton, kiu en tiu momento estis apud mi, kaj diris, ke ankaŭ la aliaj du kunkreantoj ĉeestas, montrante nin ambaŭ. D-ro Zaleski-Zamenhof esprimis sian kontenton, ke tiu bonega iniciato plene sukcesis kaj dankis ankaŭ nin pro nia kontribuo. Eksciinte, ke mi estas bulgaro, li ĝoje ekridetis:

— Aha, Bulgario?! Mi estis en via lando nur antaŭ du monatoj, en „Zlatni Pjasaci“ apud Varna! Mi partoprenis internacian seminarion pri tiuj niaj markonstrulaboroj. La naturbelaĵojn, la modernajn konstruaĵojn kaj la sinceran gastamon de viaj samlandanoj mi alte aprezis! Kun ĝojo mi rememoras mian mallongan restadon en Bulgario! . . . Des pli granda estis mia ĝojo ekscii, ke via lando, estas unu el la bastionoj de la internacia Esperanto-movado, kun mirindaj atingoj en la disvastigado de nia kara lingvo.

Dum ni interparolis, la polaj kolegoj el la televizio fotis nin.

Fine mi petis d-ron Zaleski-Zamenhof skribi kelkajn vortojn por niaj legantoj. Ne havante momente ĉe mi alian paperon, mi enmanigis al li la invitolon por nia foto-ekspozicio, sur kiu li afable skribis jenan dediĉon: „Korajn salutojn al miaj bulgaraj amikoj! Mi estis en via lando antaŭ du monatoj kaj mi aprezis la etoson!“, kaj subskribis ĝin.

Mi kore dankis al d-ro Zaleski-Zamenhof pro lia afableco — en mia nomo kaj en la nomo de ĉiuj miaj samlandanoj, kaj dezirante al li sanon kaj vignecon esprimis la esperon, ke eble li denove vizitos Bulgarijon.

Tiu ĉi renkontiĝo kun la nepo de la kreinto de Esperanto estis por mi unu el la plej emociaj travivaĵoj dum la Jubilea Kongreso en Varsovio, kiun mi longe memoros.

Varsovio, julio 1987

Dončo HITROV

Unuan fojon mi vidis lin sur la podio de la kongresa salonego, en la Palaco de Kulturo kaj Scienco en Varsovio, dum la solena inaŭguro de la Jubilea 72-a Universala Kongreso de Esperanto, de kies tribunuo li kortuŝe sin turnis al la kongresanoj. Li memorigis al la ĉeestantoj pri sia festparolado antaŭ la partoprenantoj en alia UK en Varsovio en 1937, kiun nur post du jaroj sekvis terura mondmilito. En ĝi pereis preskaŭ ĉiuj parencoj de d-ro L. L. Zamenhof, barbare persekutataj far la hitleranoj kiel hebreoj kaj esperantistoj. Nun d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof estis ege feliĉa saluti homojn el ĉiuj kontinentoj, alvenintaj en la patrolandon de lia avo, por celebri la 100-jariĝon de lia kreaĵo — la Internacia Lingvo Esperanto, kiu unuigas kaj fratigas ilin en la nomo de plej humanaj idealoj.

Car mia kolego kaj amiko Roman Dobrzyński — la reĝisoro de nia komuna filmo pri Esperanto estis organizinta intervjuon kun d-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof por la Pola Televido, mi kaptis la okazon ĉeesti la intervjuon kaj notis por la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ kelkajn interesajn momentojn kaj eldirojn.

Evidentiĝis, ke la nepo de d-ro Zamenhof (same Ludoviko, doktoro de la sciencoj), parolante perfekte francan, anglan k. a. fremdajn lingvojn, ne forgesis ankaŭ sian gepatran polan lingvon. Krome, li perfekte posedas Esperanton. Li komencis sian eldiron en pola lingvo kaj daŭrigis respondi la starigitajn demandojn en Esperanto.

D-ro Ludoviko Zaleski-Zamenhof estas elmigrinta en Francion antaŭ multaj jaroj, kie li laboras kiel inĝeniero-specialisto pri maraj konstruaĵoj (artefaritaj feraj insuloj, havenoj ktp.) Jam pli ol 70-jaraĝa, sed junece aspektanta, energia, ĉiam ridetanta, li esprimis firman konvinkon, ke Esperanto delonge pruvis sian kapablon esti bonega lingvo-ponto inter la homoj, ke ĝi penetris ĉiujn sferojn de la vivo kaj de la scienco, pri kio atestas ankaŭ la fakto, ke en lia fako jam ekzistas sufiĉe riĉa literaturo kaj terminaro (marista) en Esperanto. Li estis kortuŝita pro la ĝentileco kaj atento esprimita al li kaj al liaj parencoj (multaj el kiuj same partoprenas la kongreson kiel honoraj gastoj. Li estis vere mirigita precipe pro la fakto, ke tia multego da homoj el ĉiuj partoj de la mondo, kun plej diversaj soci-politikaj kaj religiaj konvinkoj, ve-

*Korajn salutojn al miaj
Bulgaraj amikoj! Mi estis
en via lando antaŭ du
monatoj kaj mi aprezis
la etoson!*
Varsovio,
26 Julio 1987 *Dončo*


BERLINAJ ESPERANTISTOJ EN LA JUBILEA JARO

Ni Berlinaj esperantistoj ĉi-jare notas du gravajn jubileojn — la jubileo de nia urbo, kiu fariĝis 750-jara kaj, 100-jariĝon de Esperanto.

La komenco de Esperanto en Berlino estis ligata kun la nomoj de konataj sciencistoj, kiuj agadis tiel en la burĝa pacmovado, kiel ankaŭ en la Esperanto-movado, laŭ la vortoj de Bertha von Suttner: „Esperanto kaj pacifismo estas gefratoj“. Fine de 1903, laŭ konsilo de Zamenhof mem, la svisco Jean Borel fondis la unuan Esperanto-grupon en la tiama ĉefurbo de la Germana Imperiestra Regno. Personeco kiel Adolf Schmidt — universitata profesoro kaj direktoro de astronomia observatorio, Wilhelm Wetekamp — gimnazia direktoro kaj Friedrich Wilhelm Förster — universitata profesoro, reprezentas la esperantistan agadon tiutempe. Alfred Hermann Fried, fondinto de la „Germana pacsocieto“ en 1903 verkis germanlingvan lertfolibron de Esperanto. El la Berlina grupo eliris la iniciativoj por disvastigo de Esperanto en Germanio, por la fondo de la Germana Esperanto-Asocio. En tiu ĉi burĝa organizo diversaj eĉ kontraŭaj tradiciaj linioj videblis. Förster en 1914 estis unu el tiuj kuraĝaj kvar germanaj sciencistoj (alia estis Albert Einstein), kiuj reagis al militpraviga alvoko per kontraŭmilita alvoko „Al la Eŭropanoj!“. Semtempe Berlinaj esperantistoj dissendis tra la lando kontraŭmilitajn raportojn, disfamigante la idealon de Zamenhof, kiu kelkfoje mem estis en Berlino kaj nun, en sia alvoko „Post la granda milito“, ankoraŭ pli akte ripetis la kondamnon de la militarismo.

Jam post la kongreso en Dresdeno (1908) ankaŭ en Berlino la laboristaj esperantistoj fondis propran grupon, kiu en 1911 partoprenis la fondon de la Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA). En la 20-aj jaroj la influo de klas-konsciaj laboristoj plifortiĝis. Spite al la skismo kaŭzita de Sprock en 1929 la plejmulto de la laboristaj esperantistoj en Berlino intensigis la politikan laboron en GLEA, kiu en 1930 aliĝis al la Komunismo de Interesatoj por Laborista Kulturo kaj partoprenis la batalon de la klas-konscia revolucia germana proletaro, subtenante al antifaŝisman unuecfrontan politikon de Thälmann. En 1931 en Berlino agadis 7 grupoj de GLEA kun 180 membroj. Sub la gvido de Erwin Schleusener, Ludwig Schödl kaj Alfred Schwarz la Berlinaj laboristaj esperantistoj faris bonrezultan labo-

ron. Ekzemple, estis organizata konkuro kun la Moskva SEU-grupo kaj iniciatita ligo inter la Berlina AEG-elektrozono kaj uzino en Moskvo. Post dumonata restado en Sovetunio, kie Erwin Schleusener, Adolf Schwarz, Schlecht kaj Erich Lüge transdonis al la Moskvanoj Berlinan flagon, ili raportis en la broŝuro „Kion ni travivis en Sovetunio“ pri siaj impresoj. Intertempe Berlino evoluis kiel centro de la laboro de GLEA, eĉ graviĝis por la internacia Esperanto-movado. Jam depost 1930 ĉi tie aperis la unua numero de la „Internaciisto“, organo de la klasbatala espe-



rantistaro kaj de ties opozicio en SAT. En unua deklaro estis karakterizita la ideologio de la SAT-direkto kiel konfuzo kaj neproleta, supertakso de la graveco de Esperanto, ignoro de la nacia demando, falsado de la nocio proleta internaciismo, subteno de la imperiismo kaj de la koloniisma supremo. En Berlino la opozicio instaligis ligan bureon kaj formulis sian programon. Kulinon travivis la revolucia Esperanto-movado la 21-an-25-an de aŭgusto 1932, kiam en Berlino konvenis 348 laboristaj esperantistoj el 11 landoj por fondi la „Internacion de Proleta Esperantistaro“ (IPE). La kongreson malfermis la juna prezidanto de GLEA Willi Vildebrand el Berlino. Al IPE aliĝis 72% de ĉiuj organizitaj proleta esperantistoj. Kiam la faŝismo transprenis la potencon en Germanio, estis detruita la IPE-centro en Berlino, estis malpermesita „Arbeiter-Esperantist“ kaj „Internaciisto“. La buroo de LEA parte estis detruita. Laboristaj esperantistoj partoprenis la kontraŭligan batalon. „Arbeiter-Esperantist“, kies lasta numero aperis en februaro 1933, estis kelktempe eldonata kiel stencilita bulteno. Materialo kamuflita kiel reklamo por Nivea ĉifrite raportis pri 15 LEA-grupoj en Berlino kaj pri la Proleta Esperanto-Korespondo. Somere de

1933 estigis en Berlino laŭ iniciativo de la iama LEA-funkciulo Adolf Schwarz kontraŭleĝa rezist-grupo, kiu ekzistis ĝis 1944 kun subgrupoj en 10 urbodistriktoj.

Post la venko super la faŝismo kaj post la liberigo de Berlino fare de la sovetia armeo ankaŭ berlinaj esperantistoj partoprenis la antifaŝistan-demokratian rekonstruon en nia urbo. Ludwig Schödl kunlaboris kun la sovetia armeo por prizorgi infanojn de viktimoj de la faŝismo. Enkadre de la movado de packonsilantaroj li aktive agadis ankaŭ per Esperanto. Li, kiel aliaj iamaj funkciuloj de GLEA (ekzemple Willi Vildebrand, Rudi Graetz, Otto Bäßler, Erwin Schleusener kaj Rudolf Hahlbohm) la 31-an de marto 1965 fondis en Berlino la Centran Laborrondon Esperanto, kiu en 1981 transformiĝis en Centran Estraron de la Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR. Ĝia buroo ĉiam estis en Berlino. Laŭ la ĉeftaskoj, de la Kulturligo, la Berlinaj esperantistoj, konsciaj pri la progresmaj tradicioj de la Berlina Esperanto-movado, kontribuis per siaj specifaj rimedoj al la socialisma konstruado en la ĉefurbo de GDR, al la disvastigo de realisma bildo pri la kulturo, scienco kaj politiko en nia lando kaj al la internacia pachtalo. Intertempe multaj eksterlandaj esperantistoj nin vizitis, inter ili la gvidantoj de la Esperanto-asocioj de socialismaj landoj kaj funkciuloj de MEM kaj UEA, ekzemple Prof. Isaev, Nikola Aleksiev, Humphrey Tonkin kaj Clément Tholet. Ni renkontiĝis kun vojaĝgrupoj el diversaj landoj kaj havas amikajn rilatojn kun eksterlandaj Esperanto-grupoj. Berlinanoj donis interesajn impulsojn al la Esperanto-movado en nia lando. Mi nur mencias la imponan tradukan laboron de D-ro Karl Schulze kaj la lingvosciencajn esplorojn de D-ro Detlev Blanke. La eblecoj de la lernado depost la mezo de la 70-aj jaroj plibonigis per la kursoj en la popolaltlernejo. En la lastaj jaroj en Berlino plivigliĝas la junulara laboro. Ekspozicio, kiun gejunuloj okazis de la jubileo preparis, enhavas leterojn el multaj landoj pri la rilatoj de esperantistoj al nia urbo. Tiuj ĉi esprimriĉaj kontribuoj montras, ke ili sentas sin proksimaj al nia pacama ĉefurbo de pacama lando.

Tiu ĉi kontribuo de niaj junuloj al la jubileoj videbligas, ke ni Berlinaj esperantistoj digne daŭrigas la progresmajn tradiciojn de la Esperanto-movado en nia urbo.

Fritz WOLLENBERG

Apostolo de nia ideo



Ordinare junaj homoj ŝercas pri pli maljunaj. Tiel ofte okazis al Minko Conkovski. Kiam oni demandis lin, kiom aĝa li estas, li ne respondis, ĉar li sentis sin juna. Liaj samaĝuloj jam malaperis, sed li vivis kaj regule vizitis kunvenojn, internaciajn kaj naciajn kongresojn, dum ripoztagoj ekskursis kaj soife trinkis akvon el iu kristala fonto. Li nek fumis, nek drinkis, vivis kiel centprocenta abstinenculo.

Vi certe konjektas, karaj legantoj, ke mi parolas pri mia amiko, kiu forpasis en la mezo de aŭgusto ĉi-jare, en sia 87-jara aĝo.

Unuafoje mi vidis lin en 1927 jaro dum eksterordinara kongreso de BEA en Sofio. Li estis pli aĝa ol mi kaj pli sperta esperantisto. Post la kongreso la tiamaj gvidantoj de BEA kondukis nin en la tendaron de sunadorantoj, adeptoj de Petro Dănov. La tendaro situis meze de arbaro, nun tie troviĝas kvartalo „Iztok“. La ĉefo de la „blankaj fratoj“ reklamis antaŭ la kongresanoj slan „instruon“. Forlasante la tendaron, Minko parolis:

— Ilia idolo estas la suno. Ni kiel ateistoj preĝas al la Racio.

Reveninte Sofion, Minko akompanis min al librejo „Esperanto“ kaj rekomendis al mi kelkajn esperantajn librojn, interalie versaĵojn de Hristo Botev, kaj ateismajn broŝurojn en bulgara lingvo. Tiel dank' al Minko mi fariĝis liberpensulo.

Duan fojon mi renkontis lin en 1929, dum la kongreso de BEA en urbo Vidin. Ni estis tute nepostulemaj kongresanoj. Oni loĝigis nin en iu lernejo. Anstataŭ matracoj, sur la planko estis pajo kaj ni dormis po 20—30 personoj en unu ĉambro. Minko amuzis nin rankontante anekdotojn, kaj Ivan Iliev ludis per la ŝalmo.

En la kongresa tagordo oni antaŭvidis ekskurson al la rumana urbo Kalafat, sur la maldekstra bordo de Danubo. Sed kiamaniere veturi al Rumanujo sen pasporto? Minko konis la kutimojn de la rumanaĵ doganistoj kaj proponis al la prezidanto de LKK, ke ni veturu al Kalafat, donacante cigaredojn al la doganistoj. Ni ĉiuj aĉetis po unu-du skatolojn kaj tiel ni transiris

Danubon. La loĝantoj de la urbeto miris pri la verda karavano. Ĉe la sojlo de iu domo Minko rimarkis knabinon, aliris ŝin kaj enmanigis al ŝi Ĉefeĉ-ŝlosilon. Senlaca propagandisto li estis ĝis la lasta spiro.

Post la landa kongreso karavano el centkvindek esperantistoj ŝipveturis al Budapeŝto por partopreni la 21-an Universalan Kongreson de Esperanto. Minko staris sur la supra ferdeko kaj ŝvingis la verdan standardon. En la hungara ĉefurbo, dank' al sia komunikigema karaktero, li gajnis multajn amikojn el diversaj landoj.

La 21-a Universala Kongreso de Esperanto estiĝis unua por li. Post la Dua Mondmilito li regule vizitadiĝis internaciajn kongresojn. Dum la 48-a en Sofio li estis LKK-ano kaj modele plenumis siajn taskojn.

Antaŭ la Dua Mondmilito Minko laboris kiel reprezentanto de iu firmao. Li vojaĝis de urbo al urbo, proponante ĉarpentmaŝinojn kaj ĉarpentilojn. En ĉiu urbo kaj urbeto li kontaktis la lokajn esperantistojn, havigis al ili Esperantan literaturon kaj lernolibrojn, kolektis abononon por „Bulgara Esperantisto“ kaj „Balkana Laboristo“. Foje en urbo Sliven policano vidis lin paroli kun la esperantistino Tinka Lakova, membro de BuLEA. Li ŝajnis suspekta kaj la policano arestis lin. Traserĉante lian ledan tekono, la policano trovis ateistajn broŝurojn, fotografiaĵojn de murdita sekretario de kompartio. Oni skurgis lin kaj forpelis el la urbo. Skurgoj ne timigis lin. Li daŭrigis propagandi por nia afero kiel vera apostolo.

Kiam post la fino de la Dua Mondmilito ekestis paco, BEA ekspiris libere, sed ĝiaj gvidantoj estis sen groŝo en la poŝo. Oni turnis sin al Minko, sperta en komercaj aferoj. Li proponis fondi kooperativon. Oni subtenis lin. Kune kun Evstati Cifudov ili komencis varbi membrojn. Aligis kelkcent esperantistoj. Minko estis elektita prezidanto de Bulgara Esperantista Kooperativo (BEK). La kooperativo malfermis librejon, instalas presejon, eldonis librojn. BEK fariĝis materiala bazo de la bulgara Esperanto-movado.

Luj influaj malamikoj de Esperanto provis likvidi BEA. Minko kun fidelaj amikoj batalis ĝis plena venko. BEA restis memstara, sendependa. La supreniro komenciĝis per la impona kongreso en 1956 jaro.

La plej amasa bulgara societo „Maksim Gorkij“ elektis lin vicprezidanto. Senlace li kolektis kotizojn, varbis abonantojn por „Bulgara Esperantisto“ kaj „Nuntempa Bulgario“, kunlaboris per tradukaĵoj kaj artikoloj.

Ĝisosta esperantisto, lia devizo estis: neniam kapitulaci, neniam fleksiĝi. Estante jam 75-jara li kun junula energio fariĝis administranto de revuo „Scienca Mondo“ kaj varbis abonantojn enlande kaj eksterlande. Dek jarojn li dediĉis al tiu grava revuo kaj retiriĝis en sia 85-jara aĝo. Sed li ne laciĝis sub la ŝarĝo de la jaroj. Aktivis en kunvenoj kaj konferencoj, varbis novajn membrojn, verkis artikolojn kaj referaĵojn ĝis la malsano venkis lin el la antaŭtago de lia 87-jariĝo — la 19-a de oktobro.

Jen tia estis Minko Conkovski — ekzemplo por ĉiuj!

Hristo GOROV



VOJAGIMPRESOJ PRI JAPANIO

Vasja Cvetkova. Vojagimpresoj pri Japanio. Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1986. Paĝoj: 68. Prezo: 3,60 lv. Formato: 13×20 cm.

En 1983 Vasja Cvetkova — administra sekretariino de MEM kaj sekretariino de la Virina Komisiono ĉe BEA, estis invitita prelegi en diversaj japanaj urboj. En daŭro de 1 monato ŝi vizitis la urbojn Jokohama, Tokio, Osaka, Kamakura, Kameoka, Nara, Nagoja, Hiroŝima, Nagasaki k. a. Ĉie ŝi gastis al siaj amikoj-esperantistoj, kiuj akceptis ŝin afable, proponis al ŝi varmajn zorgojn kaj plej bonan eblecon vidi Japanion de proksime, transdonis ŝin de mano al mano — en la plej bona senco de tiu vorto — tiel, ke ŝi eĉ por momento ne sentis sin soleca kaj fremda en tiu malproksima nekonata lando.

Rezulto de tiu vizito, interalie, estas la recenzata libro. La aŭtorino proponas al ni bukedon el freŝaj, variaj impresoj — bildoj de urboj, de montoj kaj lagoj, pecoj de japana antikveco, de japana nuntempa vivo kaj moroj. . . Si aparte emfazas la intereson de

la nuntempa japano al la aliaj popoloj, ties maltrankvilon pri la paca estonto de la homaro. Ŝia rakonto abundas je multaj konkretaj faktoj pri la lando.

Ege impresa estas la rakonto pri renkontigo de la aŭtorino kun la frato de la japana tradukinto el Esperanto de la Dimitrov-raporto antaŭ la VII Kongreso de la Kominternio (1935). Ne hazarde, antaŭ ol estis presita la libro mem, tiu fragmento el la manuskripto estis publikigita en la bulgara ne-Esperanta gazeto.

Dum ŝia restado en Japanio, kiel mi jam menciis, Vasja Cvetkova prelegis antaŭ japana E-publiko pri temoj: „Bulgara porpaca Esperanto-movado“, „Laborantaj virinoj en Bulgario“, „Internacia Esperanto-Kursejo“, „Bulgario 13-jarcenta“, Ŝiaj prelegoj provokis vigan intereson al malgranda Bulgario. En la libro aparte estas subtekita la kontribuo de la Esperanta kaj speciale de la japana ne-Esperanta gazeto por popularigo de ŝia veturado tra la lando kaj de ŝiaj prelegoj.

Por la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ la apero de „Vojagimpresoj pri Japanio“ ne estas surprizo — oni certe ne forgesis, ke en n-roj 10 kaj 12/1984 kaj 2,4 kaj 5/1985 ni publikigis fragmentojn de la manuskripto de Vasja Cvetkova sub titolo „Japanio — malproksima kaj proksima“. En daŭro de duonjaro ni sekvis ŝiajn paŝojn tra malproksima Japanio, kiun ankaŭ multaj el ni ege ŝatus viziti. . . Plu malfrue ni ricevis amason da leteroj esprimantaj la kontentecon de la legantaro pri tiu nia publikaĵo.

Kaj jen, nun ili ĉiuj, kiuj kontentis pri tiuj japanaj vojaĝimpresoj, havas la ŝancon legi la kompletan version, en formo de belaspekta libro, kun luksa kovrilpaĝo kaj aldono el dudeko da kolorfotoj, ĝui la plenan bildon de tiu mirinda vojaĝo — duoble mirinda, ĉar ĝi ne estas sole vojaĝo tra Japanio, sed, antaŭ ĉio, vojaĝo tra japana Esperantujo.

Alloga temo, abundo de faktoj kaj impresoj, freŝa rakontmaniero faras el tiu libro preferatan legaĵon por ĉiuj.

Lidia RAEVA

ABONU TUJ!

KARAJ LEGANTOJ,

ABONU TUJ REVUON „BULGARA ESPERANTISTO“ — monata organo de Bulgara Esperantista Asocio!

- „BULGARA ESPERANTISTO“ estas unu el la plej malnovaj E-revuoj en la mondo — fondita en 1919
 - „BULGARA ESPERANTISTO“ traktas aktualajn problemojn de la E-movado en Bulgario kaj en aliaj landoj
 - „BULGARA ESPERANTISTO“ estas libera tribuno de la legantoj
- „BULGARA ESPERANTISTO“ disponigas al vi interesajn, originale verkitajn en Esperanto aŭ tradukitajn literaturajn verkojn de bulgaraj kaj fremdaj aŭtoroj.

Jarabono: por Bulgario — 2,90 lv
por socialismaj landoj — 5.42 lv
por ĉiuj ceteraj landoj — 5.90 lv
(aŭ egalvaloro en nacia valuto)

ABONU PERE DE REP!

ABONU LA REVUON ANKAŬ POR VIAJ EKSTERLANDAJ AMIKOJ!

ALILANDAJ LEGANTOJ POVAS ABONI ĈE LA CENTRA OFICEJO DE UEA EN ROTTERDAM — Nieuwe Binnenweg 176, 3015 — BJ Rotterdam, Nederlando.

LASTA LIMDATO — 30-a de novembro 1987.

ATENTU! LA ELDONKVANTO ESTAS LIMIGITA!

LA REDAKCIO

SENCOPLENA VIVO

La honora prezidanto de la Sumena E-societo „Vekiĝo“ kaj honora membro de BEA Atanas Bojaĝiev estas jam 81-jara. Pro lia multflanka socia agado kaj lige kun lia 80-jariĝo, la Stata Soveto de PR Bulgario distingis lin per la alta ordeno „PR Bulgario — II grado“.

Naskita en u. Omurtag, li kreskas en malriĉa, multinfana familio kaj jam kiel lernanto alfrontas la maljustaĵojn de la vivo, kaŭzitajn de la kapitalismo kaj faŝismo. Dum la aŭtuno de la ribela 1923 li lernas en la sumena knaba gimnazio. Poste studas en la Instruista Instituto kune kun Dičo Petrov, Demir Boraĉev kaj aliaj progresemaj gestudentoj. Kune kun ili li partoprenas ekskursojn, preparas kaj voĉlegas referaĵojn. De tiu tempo datigas lia intereso al Esperanto, kies noblajn ideojn pri amikeco kaj kunlaborado inter ĉiuj homoj li entuziasme ĉirkaŭprenas. Poste — kiel instruisto en la vilaĝeto Iljino, en la malriĉa Omurtagregiono At. Bojaĝiev fariĝas membro kaj delegito de UEA, membro de BuLEA. Li estas instruisto ĝis 1935, kiam estas eksigita „por ĉiam“ pro „kontraŭŝtataj ideoj“. Unu jaron kaj duonon li estas senlabora, poste 4 jarojn laboras en arbarprodukta kooperativo en v. Babjak en Rodopi-montaro. Nova eksigo pro la samaj kaŭzoj. Kune kun sia familio Atanas Bojaĝiev traveturas la tutan landon, serĉante laboron. Malriĉe ili vivas, sed li neniam perdas sian kredon je la bona estonto.

Venas la 9-a de Septembro 1944. Komenciĝas periodo de fruktodona, entuziasma laboro. Unue Atanas Bojaĝiev estas lerneja inspektoro. Sekvas laboro en la Distrikta Konsilantaro — Sumen. Poste li estas sekretario de fako „Propagando“ en la UK de BKP kaj peniĝas kiel ĉefredaktoro de ĵurnalo „Sumenska zarja“. Atanas Bojaĝiev estas unu el la iniciatintoj de renovigo de E-societo „Vekiĝo“, kies multjara prezidanto li estis.

Nun la veterano rakontas: „Malriĉa, sed heroa estis la Omurtaga regiono. En Iljino la instruistoj estis veraj popolagantoj. Ni laboris en la legejo, kreis abstinenculan societon, organizis vesperlernejon por la vilaĝanoj kaj aktive partoprenis la agadon de la instruista sindikato. Mi kaj mia vivkamaradino Zdravka organizis E-kurson. Komencis diligente lerni multaj gekolegoj kaj kelkaj vilaĝanoj, inter kiuj ankaŭ la instruisto Dimităr Kamburov, poste heroe pereinta kiel estro de partizana taĉmento. Mi korespondadis kun geesperantistoj el diversaj landoj. Sed plej interesa estis la korespondado kun la soveta instruisto Mihail Ohotin el la ukraina vilaĝo Rakaŝevo. Tio estas granda, eksterordinara amikeco! Liaj leteroj prilumis la veron pri la unua socialisma lando. Li sendadis al mi la revuojn: „Ogonjok“, „USSR na strojke“, „Bezboj-

nik“, kiujn poste mi kaŝis en metala skatolo kaj enterigis. Antaŭ nelonge mi disigis kun tiuj karaj por mi memoraĵoj. Mi donacis ilin al la Distrikta Arkivo — Sumen. De tiuj revuoj mi kaj aliaj kolegoj tradukis kaj enskribis en speciala kajero la plej interesajn materialojn, jam legitajn de la aliaj gekolegoj kaj vilaĝanoj. La polico eksciis kaj malpermesis al mi korespondadi kun USSR. Sed la sovetaĵ leteroj kaj gazetoj denove atingis min, ĉi-foje tra Francio. Transsendis ilin la esperantisto Romeo Biŝe. Dum la Lejpciga proceso, dank' al tiu franca kamarado, mi informis miajn gekolegojn pri la giganta batalo de G. Dimitrov kontraŭ la faŝismo.

Kun M. Ohotin mi denove ekkorespondis en 1974. La Distrikta Komitato de KPSU en u. Cistopol helpis al mi retroviĝi. Ohotin pasis tra la tuta milito kiel oficiro, restis viva kaj sana, eĉ gastis al mi antaŭ kelkaj jaroj. Ĉu vi kredas? Tio estas unu el la plej felikaj momentoj en mia vivo!“

Atanas Bojaĝiev estas honora membro de BEA, honora prezidanto de DE de BEA — Sumen, kaj de nia societo „Vekiĝo“, sindone partoprenas la E-movadon, renkontigas kun „Vekiĝo“-anoj, rakontas rememorojn. Li diras: „Mi konsideras, ke dum mia tuta konscia vivo mi dediĉis ĉiujn miajn spiritajn kaj fizikajn fortojn al la Partio kaj al Esperanto, al la homoj kaj al la pachtalo. Felika mi estas, ke mi ĝisvivis la 100-jaran jubileon de Esperanto“.

Cvjatko TODOROV

NEFORGESEBLA VESPERO

E-societo „David Sasonov“ en Asenovgrad organizis vesperon dediĉitan al la lokaj E-veteranoj — Atanas Gaev, Dimităr Andreev — Gandi, Mihail Arabaĝiev ka. Ĉeestis ankaŭ novaj geesperantistoj, kiuj antaŭ nelonge sukcese finis E-kurson kaj nun ricevis sian diplomon.

La solenaĵon malfermis la societa prezidanto Emil Ĉirpanski. Junpioniroj deklamis en Esperanto. La veteranoj rakontis pri sia kontraŭfaŝisma agado per Esperanto, pri sia kunlaboro kun David Sasonov kaj Hristo Gorov. Atanas Gaev recitis sian versaĵon „Al veteranoj“, sonis kantoj en Esperanto.

Tiun neforgeseblan vesperon — unu el la kelkaj aranĝoj, kiujn la esperantistoj el Asenovgrad dediĉis al la 100-jara jubileo de Esperanto, longe memorus la veteranoj kaj ankaŭ la novaj geesperantistoj, ĉar fakte ĝi transformiĝis en renkontiĝon de diversaj E-generacioj.

Rozka STOJĈEVA,
vicprezidantino de E-societo
„David Sasonov“ — Asenovgrad



DISTRIKTA LABORBRIGADO EN

KARLOVO

De la 1-a ĝis la 20-a de julio 1987 en u. Karlovo duan fojon estis organizita junulara esperantista laborbrigado kun internacia partopreno. Ĝi estis iniciatita de la loka E-societo kaj organizita per la helpo de la loka Komunuma Konsilantaro kaj de DE de BEA — Plovdiv.

Ci-jare 60 junaj esperantistoj el Bulgario, Pollando, Hungario kaj GDR, sub la gvido de la brigadestro ing. Bojidar Leonov kaj de la vicbrigadestro P. Bărzaški, entuziasme laboris por bonkonstruado de la urbo lige kun la 150-a datreveno de la naskiĝo de Vasil Levski.

Dum sia libera tempo la brigadanoj vizitis la naskiĝdomon de Levski, la mineralakvan basenon en v. Banya. Estis organizitaj ekskursoj al urbo Sopot kaj al belaj lokoj en Balkanmontaro, al la Baĉkovo-monaĥejo en Rodopi-montaro kaj al Plovdiv, kie en la antikva teatro la brigadanoj vidis interesan spektaklon. Vespere oni organizis internaciajn programojn. La brigadanoj longe ne forgesos la koncerton de kantgrupo „Joan Kukuzel“. Kulmino de la kultura programo estis partopreno en la nacia celebrado de la datreveno de Levski, la 18-an de julio. La eksterlandaj brigadanoj havis la ŝancon partopreni en dutaga ekskurso al la historia montopinto Sipka kaj al Gabrovo.

Menciindas la fakto, ke la brigado altiris la atenton de la amaskomunikiloj. La distrikta plovdiva gazeto „Oteĉestven glas“ sur sia unua paĝo aperigis informon pri la brigado; pri ĝi raportis gazeto „Karlovska tribuna“. Radio Sofio en sia populara ĉiuvendreda rubriko „Interparolo kun vi“ dediĉis kelkajn minutojn al la laboro de la junaj brigadanoj-esperantistoj en Karlovo. Oni povis aŭdi la voĉojn de Jolanta Barlog el Poznań, Pollando kaj de Bojidar Leonov.

Membroj de E-societo „Kulturo“ — Plovdiv, faris amikan viziton ĉe la brigadanoj. Grupo el 20 personoj-esperantistoj, geaktoroj, legejaj agantoj estis en Karlovo la 9-an de julio.

El amika babilado kun kelkaj junaj polinoj estiĝis klare, ke la brigadanoj plezure plenumas sian laboron, ĝuante la freŝan montaran aeron de la pitoreska urbo meze de la Roza Valo. Vespere de la sama tago estis prezentita belarta programo, dediĉita al la bulgara nacia heroo Vasil Levski.

La solenaĵon malfermis B. Leonov. Veselina Kurteva, aktorino kaj prezidantino de societo „Kulturo“, parolis pri la vivo kaj la personeco de Vasil Levski. Recitalon pri Levski, laŭ verkoj de Ivan Vazov, Ĥristo Karpaĉev, Evtim Evtimov plenumis la aktoro el Plovdiv Ivan Josifov. Rememorojn de kunbatalantoj de la Apostolo tralegis Danĉo Danev. Lilia Sotirova prezentis sian tradukon de la versaĵo „Kăkrina noktejo“, verkita de Evgenia Bakova, kaj V. Kurteva recitis la Botev-versaĵon „La pendumo de Vasil Levski“.

La brigado plenumis siajn taskojn, ĝi estis vere sukcesa. Ni esperu, ke la sekvontaj estos ankoraŭ pli sukcesaj.

Emilia PEJČINOVA
Veselina KURTEVA

Poezio

„PACO“

Paco,
respegulu niajn amojn,
kaj esperojn!
Paco,
simbolu niajn provojn,
klopodojn!

Elversigu tra l'vorto,
plej belaj sloganoj,
koreldiroj elokventaj,
paroltipoj altsignifaj,
de la penso-liberuloj!

Paco,
mev-igu super ondoj,
homamasaj,
pioniraj, energiaj,
batalantaj ties-voje!

Kronigu super tuto,
de l' humanaj registaroj!
Farigu dolĉaromo,
de belruĝaj amo-rozoj,
amikece donacitaj!

Kaj aŭdiĝu madrigale,
ĉe l'animoj progresemaj,
en aŭroro de l'feliĉo!

Fino Ŝirin AHMAD-NIA, Teherano,
(II premio por versaĵo en la Literatura
Konkurso de „Bulgara Esperantisto“)

KOLOROJ

Tiel blanka paco —
kiel la flugantaj kolomboj
de la soliaj placoj,
aŭ kiel la neĝo,
kronanta la monton,
kie grandiloro kantas:
„Хей Балкан ти роден наш!“

Tiel ruĝa sango —
kiel la giganta valoro
de la brava junularo,
kiu „en la popola nomo“
kontraŭsemis rozojn
pro la faŝista orgio.

Tiel verda naturo —
kia la Esperanta flagkoloro
memorigas belajn arbarojn,
kie esperplenaj, marŝante,
gerilaj voĉoj ankoraŭ krias:
„широко. . . зелено, хей!“

Kaj inter verda, ruĝa, blanka,
en la nokto plena de steloj
„Radecki“ denove brilas
laŭ la maltrankvila Danubo.
Kaj du infanoj silentaj ploras,
teksante siajn martenicojn,
ĉar la tero ankoraŭ tremas
pro la morto de Vapcarov.

Jen la trikolora nacio
de Cirilo kaj Metodjo,
la trikolora standardo
de la filoj de Asparuho.
Kaj la novaj ridetoj
la realigitaj sonĝoj
„Ĥorkanto“ verdiginta.
pro la Nigramara suno.

Jen, Bulgario! . . . Jen!

Gustavo C. MORALES, Kubo
(Kuraĝiga premio por versaĵo en la
Literatura Konkurso de „Bulgara
Esperantisto“)

Enlanda movado

GOJA FESTO

La 13-a de junio estis por ni duobla festotago. Unue ni ĉeestis la nacian celebron de 100-jariĝo de Esperanto. Poste, en la posttagmezaj horoj de la sama tago okazis kunveno dediĉita al la 20-jara jubileo de Fervojista Esperantista Societo „Aristo Botev“. Petranka Lalova—prezidantino de la societo, tralegis raporton, en kiu ŝi substrekiis, ke multaj gekamaradoj perfektigis pri la lingvo kaj plivastigis siajn internaciajn kontaktojn. La ekspozicio el materialoj pri la vojaĝoj de Neli Abaĝieva tra Latin-Ameriko kaj el leteroj kaj poŝtkartoj de Georgi Litov estis tre bela.

La kunvenon salutis: prof. d-ro K. Popov — prezidanto de la Ĉefurba Estraro de BEA, samideanoj el Plovdiv, Gorna Orjaŭovica, Varna k. a. Ĉiuj respektis la devigan regulon: inter si la esperantistoj devas paroli nur en Esperanto.

Post la kunveno 55 gesamideanoj vizitis montodomon „Rodina“ kaj daŭrigis la festadon. Oni metis freŝajn florojn ĉe la monumento de la pereintaj batalantoj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo.

Vespere oni ŝakludis, amuziĝis, interparolis, deklamis versaĵojn. La teda urba bruo cedis lokon al silento kaj al dolĉaj najtingalaj kantoj.

La sekvan tagon okazis novaj iniciatoj: tombolo, projekciado de diafilmoj, kiuj montris ĉarmajn vindingaĵojn kaj travivaĵojn dum la Universala Kongreso en Ĉinio. Maja Gorova kaj Bogomil Jivkov detale kaj atentokapte klarigis la bildojn.

Georgi NEJKOV

Tra la gazetaro

EN SOFIO:

Ĵurnalo „Rabotniĉesko Delo“ (27. VII. 1987) publikigis korespondadojn de sia propra korespondanto en Varsovio pri la inaŭguro de la 72-a Universala Kongreso de Esperanto; la sama ĵurnalo en sia numero de 4. VIII. 1987 lokis artikolon pri Esperanto-movado en GDR, ĵ. „Oteĉestven Front“ (15. VII. 1987) en informo pri la celebros de la granda laborista gvidanto Vasil Kolarov mencias, ke la muzeon „V. Kolarov“ en u. Sumen vizitis esperantistoj el GDR kaj Vjetnamio; la semajna gazeto „Narodna Kultura“ (15. V. 1987) aperigis grandan artikolon de Maria Jankova-Bojaĝieva pri Bulgara Esperanto-Teatro.

EN LA LANDO:

Ĵurnalo „Dunavska Pravda“ — u. Ruse (21. VI. 1987) publikigis informon de Jordan Kalinov pri spektakloj en Esperanto en la Stata Puĝteatro en Ruse; sama ĵurnalo de la 19. VII. 1987 aperigis informon, same de Jordan Kalinov, pri antaŭstaranta partopreno de multnombra delegitaro el Ruse-distrikto en la 72-a Universala Kongreso en Varsovio, ĵ. „Oteĉestven glas“ u. Plovdiv (28. VII. 1987) publikigis kvarkolumnan raportadojn de Conka Mereteva pri Esperanto en Plovdivaj lernejoj; ĵ. „Ŝumenska zarja“ — u. Sumen (10. VI. 1987) aperigis informon de Cvjatko Todorov pri distingo de lernanta esperantista amatora teatra grupo dum la Botev-recitalo en u. Vraca; la sama ĵurnalo (12. VII. 1987) presigis informon denove de Cvjatko Todorov pri E-ekspozicio en la distrikta biblioteko Vasil Kolarov okaze de la jubileo; en. ĵ. „Oteĉestven zov“ u. Vraca (17. VII. 1987) aperis granda artikolo de Bojĉo Mladenov „Esperanto — lingvo de la kosma erao“; ĵ. „Septemvri“ — u. Stara Zagora (14. VII.

1987) aperigis artikolon de Petko Bonev pri la centjara jubileo; ĵ. „Balkansko Zname“ — u. Gabrovo (17. IV. 1987) presigis informon de Sonja Tiĥova pri vespero, dediĉita al la jubileo; en la sama ĵurnalo (18. VI. 1987) denove Sonja Tiĥova informas pri tuturba solenaĵo okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto; ĵ. „Septemvrijsko zname“ — u. Pazarĝik (18. VII. 1987) donis lokon al granda artikolo de Petko Arnaudov pri la jubileo; la urba gazeto „Asenovgradski zov“ — u. Asenovgrad (1. VIII. 1987) presigis artikolon pri la jubileo de Atanas Gaev.

Tra la mondo

ESTONA RADIO ELSENDAS EN ESPERANTO

Unua elsendo estis realigita la 6-an de aŭgusto ĉi-jare kaj ili okazas regule ĉiun unuan kaj trian ĵaŭdon je la 22.30 laŭ internacia tempo per ondoj 290 m -1034 kh/ kaj 49.3 m/6085 kh/.

Ripetado okazas la sekvan dimanĉon je 9.25, per samaj ondoj. Nun la elsendo daŭras 5 minutojn, sed se estos eksterlandaj leteroj kun proponoj, kritiko, ktp, la tempon oni certe plilongigos!

Leterojn sendu al: EESTI RAADIO, 200100 TALLIN' Esperanto.

UNESKO KAJ ESPERANTO

La teksto de la parolado de la Generala Direktoro de Unesko, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, per kiu li akceptis la Premion Zamenhof por Internacia Kompreniĝo, aljuĝita al li en 1986, estis lastatempe distribuita al ĉiuj ŝtatoj — membroj kiel dokumento DG/86/52. En oktobro pasintjara, s-ro M'Bow skribis al ĉiuj naciaj Unesko-komisionoj, memorigante ilin pri la rezolucio de 1985 de la Generala Konferenco de Unesko, kiu rekomendis pli vastan utiligon de Esperanto-kaj notis la centjarigon de la lingvo.

Kiel praktika sekvo de la Unesko-rezolucio, unuafoje la Internacia Foirao Esperantista Renkontiĝo (IFER) en Leipzig ricevis oficialan aŭspicion de la Unesko-komisiono de Germana Demokratia Respubliko. La estro de la kultura sekcio de la Komisiono salutis la Renkontiĝon en bona kaj klara Esperanto.



VIZAGE
AL KEF-2

Antaŭ unu jaro en la malnova sveda urbo Uppsala sukcese okazis la unua Kultura Esperanto-Festivalo (KEF).

Tio kuragigis la organizantojn kaj nun ili komencis la preparajn laborojn por la dua festivalo.

Ĝi okazos en 1988, inter la 18-a kaj la 21-a de aŭgusto en Lund, Svedio. Ankaŭ ĉi-foje, en la 4-taga festa programo de KEF estos prezentitaj precipe originale verkitaj kulturajĵoj en Esperanto.

Do, ni invitas verkistojn, muzikistojn kaj aktorojn partopreni per siaj verkoj la Duan Kulturajn Esperanto-Festivalon. Kontakto kun ni skribe kaj proponu viajn kontribuojn!

Pliajn informojn petu ĉe: KEF, Brunnsgatan 21, S-11138, Stockholm, Svedio.



**DEZIRAS
KORESPONDI**

BULGARIO

STANA DIMITROVA GEORGIEVA (pensiulino) — 1309 Sofio, ul. Simeon 243, A-19 — pri ĉi kun ĉi.
CVETANA EFREMOVA — 1309 Sofio, j. k. „Bejanci“ ul. „Zografski manastir“ bl. 127, vñ. V, am. 52 — pri ĉi kun ĉi.

VIZA SIMEONOVA BOJEVA, Sofio, bul. „Emil Markov“ bl. 15, vñ. E, ap. 92.

NIKOLAJ TODOROV (36-jara fraŭlo), veterinara specialisto — 5500 Loveĉ, str. Vasil Kolarov 51 — dez. kor. edziĝecele kun ĉi.

RADKA STOJANOVA — 7200 Razgrad, str. Ivan Vazov 38, B, ap. 33 — dez. kor kun geinstruistoj kaj gelernantoj pri literaturo, popularto, naturo, E-movado. Interŝanĝas librojn, alforismojn, gramofondiskojn, poŝkalendaretojn, BK de katoj.

POLLANDO

GOSŁAWA GRABOWSKA (25-jara instruistino) — PL-59-300 LUBIN str. Mickiewicz 2/31 — pri turismo kaj literaturo kun ĉi.

URSZULA MOKRZYCKA (30-jara instruistino) — PL-48-256 Biedrzychowice 165 W. — Opole, — pri turismo, literaturo kaj folkloro — kun ĉi. Kolektas BK, etikedojn kaj prospektojn.

TADEUSZ RYGUKA (24-jara), PL 43-200 Pszczyna ul. Dworcowa 2 — pri turismo, folkloro, fotoarto, filmo, kun ĉi.

GNEGON WIENC (29-jara laboristo) — PL-62-005 Owińska str. Dworcowa 5/9 — pri turismo, fotoarto, filmo, kun ĉi.

RADOSŁAW RAGAN (21-jara), Katowice, ul. Stefana Batorego 7/1 — pri literaturo, muziko, turismo kaj historio, kun ĉi. Kolektas BK.

EWA KOHALCZYK (20-jara studentino), 42-300 Myszków, str. Folwarczna 1/1a — pri turismo, sporto, literaturo, kun ĉi.

SOVETUNIO

BORIS PATRUSEV (60-jara inĝeniero) — Perm — 39, p. k. 1600 — dez. kor. esperante, ruse, germane, kaj france — pri elektroflekso-terapio, kun ĉi.

DAIVA JUODCLYTE (19-jara studentino) — 232054 Vilnius, Litovio, str. Saulctekio 8-1102 — pri ĉi kun ĉi.

ALEKSANDRO PUSKANOV (34-jara), 656-57 Barnaul — 57, poŝtrestante — pri vojaĝoj, fremdaj lingvoj, literaturo, filmoj, kun ĉi.

Dek diversaj geesperantistoj (16—30-jaraj) — deziras kor. pri ĉi kun ĉi. Komuna adreso: Krivoj Rog, 53, 324053 ul. Musorgskogo 19, Dvorec Kulturi CGOKa, Esperanto-klub. Mihail Petroviĉ.

Cefredaktoro: Donĉo HITROV

Redaktoroj: Haim LEVI (vicĉefredaktoro), Maria JANKOVA

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Mariana ELENOVA, Dimităr HAĜIEV, Krăstju KARUCIN, Georgi MIĤALKOV, Venelin MITEV, prof. d-ro Kiril POPOV.

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan CALJOVSKI

Administranto: Asen JOSIFOV


ENHAVO

- 11 Kongresaj rezolucio kaj deklaro
- 1 Festparolo de prezidanto de UEA
- 3 Rezolucio de MEM
- 4 Grandioza jubilea kongreso (Donĉo Hitrov)
- 7 Sojle de la dua jarcento (Maria Jankova)
- 9 Abunda kaj varia artprogramo (Mariana Elenova)
- 10 La nepo de D-ro Zamenhof nin salutas (Donĉo Hitrov)
- 11 Berlinaj esperantistoj en la jubilea jaro (Fritz Wollenberg)
- 12 In memoriam: Minko Conkovski — apostolo de nia ideo (Hristo Gorov)
- 13 Ni recenzas: Vojaĝimpresoj pri Japanio (Lidia Raeva)
- 14 Niaj veteranoj: Sencoplana vivo (Cvjatko Todorov)
- 15 Juna Esperantisto: Distrikta laborbrigado en Karlovo (Emilia Pejĉinova, Veselina Kurteva)
- 15 Poezio
- 16 Enlanda movado; Tra la gazetaro; Tra la mondo
- III Deziras korespondi
- IV Libro pri bulgara ornamarto (Georgi Todorov)

Sur la unua kovrilpaĝo:

Parto de la oficiala prezidantaro de la 72-a UK de Esperanto.

Filatelio



Poŝtmarko-bloko eldonita en GDR lige kun la 100-jara jubileo de la internacia lingvo Esperanto.

Revuo „Bulgara Esperantisto — fondita en 1919, distingita per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldokvanto 6500 ekz.

**Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“
Bul. Hristo Botev 97**

1303 Sofio, Bulgario

P. K. 66
1 000 Sofio

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

LIBRO PRI LA BULGARA ORNAMARTO



Antaŭ nelonge en Bulgario aperis grandformata, lukse eldonita libro titolita „Bulgara popola arto de ornamado“. Riĉe ilustrita per pli ol 150 faksimiloj (koloraj kaj nigra-blankaj), ĝi estas nova kontribuo de eldonejo „Bŭlgarski Hudoĵnik“ („Bulgara Pentristo“) al la sfero de la bulgara folkloro kreado.

La aŭtoro Kiril Popov direktis sian sciencon intereson precipe al brodaĵoj, trikaĵoj, punktoj, teksaĵoj, zonoj, kusenoj, tukoj, tapiŝoj, ktp. Li traktas pli detale unu el la plej malnovaj bulgaraj ornammodeloj nomata „Arbo de la vivo“, atentigante pri ĝiaj tipaj variaĵoj. Multaj paĝoj de sia verko K. Popov dediĉas al la koloroj preferataj en la bulgara popola ornamarto, al ĝiaj karakteraj kombinoj.

Mi havis la okazon konatigi kun Kiril Popov kaj paroli kun li pri liaj interesoj de folkloresploranto, speciale pri lia verko „Bulgara popola arto de ornamado“.

— Via libro estas tipa scienca monografio, sed antaŭ via nomo mankas sciencaj titoloj. . .

— Krom profesio, la sciencaj esploroj pri etnografio povas esti ankaŭ bezono de la koro, deziro alproksimiĝi kaj mem tuŝi la belecon de la popolaj kreaĵoj. . .

Popov, Kiril. Bulgara popola arto de ornamado. Brodaĵoj, trikaĵoj, teksaĵoj. Sofio, „Bŭlgarski Hudoĵnik“, 1986, 152 p.

— Kia, fakte, estas via profesio?

— Mi estas ĵurnalisto, mi havas superan filologian kleracon. Sed, interalie, en la Sofia Universitato mi studis slavan etnografion ĉe prof. d-ro Cvetana Vranska-Romanska.

— Via libro evidente posedas sciencon valoron. . .

— Antaŭ ol alpaŝi al la verkado de tiu libro, mi preparis min en daŭro de tridek jaroj. . . Mi vizitis multajn regionojn de nia lando. En muzeoj kaj en vestkestoĵoj de centoj da vilaĝaj kaj urbaj familioj mi konatigis kun multaj modeloj de la bulgara popolarto, mi trastudis specialan literaturon pri historio, arto, etnografio, preparis reproduktadojn de faksimiloj de brodaĵoj, de paskaj ovoj, teksaĵoj, pajloverkoj ktp.


— La bulgara popolo vivis 500 jarojn sub la osmana jugo. Ĉu la arto de ornamado ne estis neniiĝinta?

— La konkerintoj detruis niajn arkitekturajn kaj historiajn monumentojn, sed ili estis senfortaj forpreni de la popolo ĝian amon kaj fidelecon al la arto de ornamado. . .

— Kion, ĝenerale, vi deziras diri al la legantoj de via libro?

— Mi ŝatus altiri ilian atenton al du gravaj momentoj. Unue — en la bulgara popolarto, kiu en plej alta grado estas harmonia, humana kaj demokratia, manifestiĝas la esenco de la bulgara nacia spirito. Due — la spirita el kresko de la nuntempa homo estas neebila sen konstanta persona kontakto kun la beleco de la popola arto de ornamado.

Georgi TODOROV



Punto el la regiono de u. Ihtiman — de la komenco de XX jarcento.